

EL POPOLA ĈINIO

中國報道

11 1981





Esplorado en Fanjing-monto




La monto situas en la nord-orienta parto de la provinco Guizhou (Gujōu) kaj ĝi kun alteco de 2.522 metroj super la mara nivelo estas la ĉefa pinto de Wulin-montaro etendiĝanta en la tri provincoj Hunan, Guizhou kaj Sichuan. Ĝi apartenas al subtropika zono, kie la klimato estas varmeta, precipitaĵo abunda kaj vegetalaro densa kaj en ĝiaj vastaj praarbaroj estas multaj valoraj animaloj kaj vegetaloj. Antaŭ nelonge scienc-esplora fakoj de Guizhou faris sintezan esploradon al la monto kaj akiris bonan rikolton.

Fotoj de XU HONGLI

En praarbaro



Fungoforma rokego interesas la esplorantojn.



Stalagmitoj en kaverno



Valoraj kolombarboj
(*Davidia involucrata*)

Altmontaj rododendroj





Esplorado de natura ekologia medio

Monata gazeto eldonata de ĈINA ESPERANTO-LIGO P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio

Enhavo

SUR LA KOVRILO:

Mongola aktorino Gegen Qimuge
de **REN SHIYIN**

SUR LA DORSKOVRILO:

Cervido apud mont-rivereto (Ĉin-
stila pentraĵo)
de **LIN KAJ**

KOLORAJ SERIOJ:


Esplorado en Fanjing-monto
Tanzhe-templo
Fotoj pri naturaj belaĵoj faritaj
de E-istoj
Kantoj kaj Dancoj de Ĝuang-oj
Popolaj Argilaj Ludiloj

NIGRAJ-BLANKAJ SERIOJ

Post eksterordinara inundo
En la 66-a Universala Kongreso
de Esperanto
Grimpado sur glava ŝtuparo

—◆—
Ĝenerala distribuanto: Esperanta
Sekcio de **GUOJI SHUDIAN**
(Centro de Ĉinaj Eldonaĵoj)
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio

Por spirita civilizacio	2
“Servo al vi”	4
La amo de “cigno”	6
Surmara fiŝista vilaĝo	9
Vizaĝe al eksterordinara inundo	13
Esperanto estu la universala lingvo de la sento	17
NIA KULTIVEJO: La ĉina komuna lingvo kaj Esperanto	20
ESP-NOVAĴOJ	21
Scienca eldona centro de UEA	23
VIDINDAJ LOKOJ: Tanzhe-templo	25
Incidento de kampara familio	27
Ĝuste en tiu ĉi angulo (Novelo)	29
En la naturparko Fanjing-monto	33
SPORTO	35
Ĉinaj Proverboj	35
EN LA REGIONOJ DE NACIMALPLIMULTOJ: Notoj pri Aŭtuna Festo de Mjaŭ-nacieco	36
SUR NIA LIBROBRETO: “La Faraono” en bildoj	38
KULTURAJ NOTOJ	39
TRA LA MONDO	40
EL ĈINA MODERNA HISTORIO: La Ĉina Popola Li- beriga Milito	41
KORESPONDI DEZIRAS	44
Pri la venontaj manĝaĵoj	46
KURANTAJ AFEROJ	48



Ilustraĵo de HE ZHENQIANG

FU QIANGNIAN:

POR SPIRITA CIVILIZACIO

LA ĉina ŝtato faras edukon aktivadon de socialisma moralo en la popolo, precipe en la junularo. Ĝi alvokas ĉiujn popolanojn kondukti civilizacie, ĝentile, pure, disciplineme kaj bonvirte, fariĝi honestaj homoj kun belaj animoj, konduto kaj paroloj, beligi la medion, ami la patrion kaj la socion.

La aktivado enkorpiĝis la ĉinan tradician civilizacion. En la historio Ĉinio ĝuis reputacion de "lando de bona moralo, rito kaj ĝentileco" kaj la ĉinoj estis famaj pro sia nobla moralo kaj ĝentileco. Post la fondiĝo de la nova Ĉinio, kun la disvolviĝo de la socia produkto kaj plialtiĝo de la kultura nivelo, patriotismo, kolektivismo, solidareco kaj amika rilato inter la homoj ricevis plian disvolviĝon. Ĉe la fino de la kvindekaj jaroj regis socia stabileco kaj nobla moraleco en la ĉinaj urboj kaj kamparo, inter la gejunuloj aperis miloj kaj dekmiloj da herooj kiaj Xiang Xiuli, heroino, kiu brave sin ĵetis en fajregon por savi ŝtatajn posedaĵojn; Liu Wenxue, knabo, kiu faris kateĝorian batalon kontraŭ malbonulo por protekti kolektivajn interesojn; kaj precipe la mode-

la armeano Lei Feng de ĈPLA, kiu faris sennombran servon al la popolo. Lei Feng mortis sur sia posteno en la aĝo de nur 22 jaroj. Li venis de kamparo al urbo kaj poste armeaniĝis. Dum sia vivo li memvole faris ĉion utilan por la ŝtato, kolektivo kaj popolo. Li estis modelo de la ĉina junularo kaj lia nomo jam fariĝis simbolo de la nobla ideo kaj abnegacia kaj senegoisma konduto — sin oferi al la patrio, servi al la popolo, esti fervora kaj amika al aliuloj.

Estas bedaŭrinde, ke en la dek jaroj de la "kultura revolucio" la anarkio agitita de Lin Biao kaj la kvarpersona bando kaj la de ili fabrikita socia ĥaoso serioze damaĝis la noblan socian moralon: lernantoj ne respektis siajn instruistojn, gefiloj ne respektis siajn gepatrojn, malaltiĝis la morala nivelo kaj pliiĝis junaj krimuloj.

Post frakaso de la kvarpersona bando, dank' al la plifortigo de la socia sekureco, kaj penado de la edukaj kaj publikaj rondoj, la socia moro ekboniĝis kaj iom post iom plimultiĝis bonaj junuloj kiuj imitas la kondutojn de Lei Feng kaj faras bonaĵojn al aliaj. Por heredi kaj

disvolvi la bonan socian moron, subtenate de la registaro, la Ĉina Komunisma Junulara Ligo, la Tutlanda Virina Federacio kaj Tutlanda Ĝenerala Laborsindikato kaj aliaj ses organizoj kune iniciatis tiun civilizacian aktivadon.

Laŭ nekompleta statistiko, sole en la 5-a de marto de la kuranta jaro t.e. la memoriga tago "Lernu de Lei Feng" 12,000,000 gelernantoj en la grandaj kaj mezgrandaj urboj de la tuta lando memvole iris sur stratojn por fari bonaĵojn, ekz. planti arbidojn kaj herbojn, fari purigadon, helpi vojaĝantajn maljunulojn kaj infanojn kaj porti por ili pakajojn ĉe stacio kaj haveno, kaj helpi senhelpajn loĝantojn purigi medion kaj aĉeti grenon kaj almanĝaĵojn en loĝkvartaloj. En Shanghai aperis junulaj servaj taĉmentoj kiuj senpage faras por loĝantoj tajloradon, razadon kaj diversajn riparadojn.

En la pitoreska turisma urbo Hangzhou cirkulis multaj kortuŝaj rakontoj. Jen ekzemplo: Iutage, la 20-a Amika Vizitgrupo al Ĉinio de la Japana Societo por Protekti Pandojn kaj Saku-rojn ekskursis ĉe la Okcidenta

Lago. S-ro Hirai Tateŝi, membro de tiu grupo glitigis sian kameran lenŝon en la lagon dum fotado. Apudstaranta knabo tuj ensaltis en la akvon por serĉi la perditajn. Malgraŭ piko de lotustigoj, li trifoje subakviĝis kaj fine trovis ĝin en ŝlimo. La japana amiko esprimis sian koran dankon kaj demandis lian nomon, sed li nur respondis: "Mi lernas de onklo Lei Feng kaj tio estas por mi farenda." Post plurfoja pridemandado oni informiĝis ke li nomiĝas Du Weiming, lernanto de la Dua Elementa Lernejo "Changzheng" de la urbo Hangzhou. Post reveno al la hejmlando s-ro Hirai Tateŝi skribis al la urbo: "La helpemo de s-ro Du estas neforgesebla por mi. Emociis min kaj miajn kunvojaĝantojn la ĉarma pejzaĝo de la Okcidenta Lago kaj la memorinda okazintaĵo. Post mia reveno, mi konigis tion al multaj el miaj amikoj, ankaŭ al miaj infanoj."

Nun la aktivado jam prosperas en diversaj entreprenoj de niaj urboj kaj kamparo kaj estas disvolvita ankaŭ en la praktika laboro.

Nun iras la aktivadoj "Donu plej bonan servon" kaj "Kontentigu la klientojn" en la urboj Beijing (Pekino), Tianjin (Tiangin), Wuhan (Vuhan), Shenyang (Ŝenjang) k.a. La vendistoj devas ne nur posedi fakajn sciojn kaj plibonigi la servadon, sed ankaŭ kondukti konvene en la vestado, mieno kaj lingvaĵoj dum akceptado de la klientoj. La Fervoja Ministerio disvolvis aktivadojn "Faru bonajn aferojn sur ĉiuj fervojoj". En la kamparo oni kondukis edukadon "Amu kamparon kaj konstruu la hejmlokon" kaj en la urboj oni instigas starigon de "civilizacia strato".

En tiuj aktivadoj iuj junuloj transformiĝis de frandemuloj kaj distremuloj en diligentulojn, iuj fervore faris vojevadon por voj-eraraĵoj, postulante nek rekompencojn nek dankojn, iuj memvole flegas maljunulojn sen gefiloj kaj iuj memvole redonas hazarde trovitajn grandajn monsumojn al la perdintoj. En la antikva urbo Suzhou cirkulas jena kortuŝa rakonto: Ding Yajuan, laborantino de iu vestofarejo, perdis paperujon kun kontanta mono de 437 juanoj kaj ĉeko de 53,000 juanoj. Ŝi estis ege maltrankvila kaj svenis pro tio. Tamen ekster ŝia atendo, la sekvantan matenon unu nekonato venis al ŝia hejmo kun tiu paperujo. Li trovis ŝian adreson en letero en la paperujo. Trovinte ke la mono kaj la ĉeko estis ne perditaj, ŝi stuporiĝis kaj ege ĝojiĝis. Kiam ŝi kun danko demandis lian nomon, tiu nenion diris. Nur post ripeta petado li diris ĉe la foriro, ke li laboras en fabriko de Suzhou.

Iuj junuloj forlasas komfortan vivon kaj volonte okupiĝas pri plej ordinaraj laboroj. Ili estas estimataj kaj laŭdataj de la popolamasoj. Yang Xicong, stratopurigistino de Xiamen (Hiamen) de Fujian-provinco, ja estas unu el tiaj ekzemploj. Ŝia familio estas riĉa kaj ŝia onklo, kiu vivas en Xianggang (Hongkong), invitis ŝin loĝi en Xianggang, kaj iu eĉ volis svati por ŝi junan riĉulon en alia lando. Sed ŝi rifuzis ĉion, dirante, ke kvankam la laboro de purigistino estas malpura kaj peza, tamen ĝi kreas por la popolo purajn kaj agrablajn mediojn. Tial ŝi preferas sin okupi pri purigado dum ŝia tuta vivo ol esti edzino de riĉulo. Multaj homoj laŭdas ŝiajn noblan ideon

kaj penan laboron, rigardante ŝin plej bela en la animo.

Rimarkinde ŝanĝiĝis ankaŭ tiuj kiuj faris erarojn aŭ krimojn. Iutage, la redaktoroj de "Vesperjurnalo de Beijing" ricevis malgrandan pakadon. Malferminte ĝin, oni vidis du brakhorloĝojn kaj mallongan leteron, en kiu estas skribite: "Mi estas junulo farinta malbonaĵon. En la lasta jaro mi forprenis tiujn du brakhorloĝojn de iu nekonato. Nun la socio edukas min esti homo honesta. Mi intencis forĵeti ilin, sed post pripensoj mi ŝanĝis la ideon — ĉar mi ne havas tian rajton. Mi devas redoni la brakhorloĝojn al la priŝtelito. Tial mi petas vin transdoni ilin al la priŝtelito por kvietigi min. Multajn dankojn." En la letero estas skribita ankaŭ la adreso de la priŝtelito. La letero finiĝis per subskribo "junulo decidinta korekti sian eraron". Redaktoro tuj telefonis al la policejo kaj oni rapide trovis la priŝteliton, maljunan laboriston. Tiu ĝoje diris: "Bona estas junulo, kiu faris eraron kaj ĝin korektis."

Nun senĉese aperas bonaj homoj kaj bonaj aferoj. Oni ĝoje diris: "Nun plibonigas la sociaj moroj tagon post tago kaj plimultiĝas helpemaj homoj."

Sed unufoja kampanjo ne povas forbalai ĉiajn malbonaĵojn de la socio, kaj la publiko montras malkontenton pro iaj sociaj fenomenoj. Ekzemple, parto de la komizoj kaj kelneroj malĝentile kondutas al la klientoj, iuj junuloj ofte aŭdigas krudajn vortojn kaj agas krude en publikaj lokoj, kaj cetere ofte okazas krimofaroj de junuloj. Tial estas necese oftigi tian moraligan aktivadon por krei socialisman spiritan civilizadon.

"SERVO AL VI"

—Pri la junulaj servaj taĉmentoj de Shanghai

TUN frumatemon el la unuaj tagoj de marto ĉijare, pli ol 1,000 gejunuloj el ĉ. 100 fabrikoj de la urbo Shanghai (Sanhajo), kun slipo de "SERVO AL VI" sur la brusto, venis el diversaj lokoj de la urbo al la parko Fuxing kaj tie starigis pli ol 60 provizorajn servejojn de hartondado, fotado, tajlado, bicikla, kudromaŝina, televidila, diktafona riparado kaj aliaj, por servi al klientoj. Ili ne postulis de klientoj rekompencan krom koston por materialo. En unu tago ili solvis malfacilojn de pli ol 20,000 klientoj en la vivo.

Tio estas aktivado de la 142 junulaj servaj taĉmentoj de Shanghai, kiuj faris servon por popolamasoj en sia libera tempo. Nun en Shanghai estas pli ol

6,000 tiaj servaj taĉmentoj kun pli ol centmil membroj.

Ili formiĝis kaj disvolviĝis laŭ la intereso de junuloj kaj socia bezono.

En la komenco de 1979, la organizoj de la Komunisma Junulara Ligo de iuj fabrikoj kaj entreprenoj de Shanghai mobilizis siajn junulojn al "ŝatokupaj grupoj" pri elektroniko, tajlado, fotado k.a. Tio kaj riĉigis postlaboran vivon de gejunuloj kaj solvis malfacilojn de loĝantoj en la vivo. En la printempo de 1980, kiam miliono da gejunuloj kaj geknaboj de Shanghai surstratiĝis por fari servon al popolamasoj, la KJL-organizoj de la Shanghai-a 3-a Bicikla Fabriko kaj aliaj entreprenoj starigis junulajn servajn taĉmentojn unu

post alia, kaj prezentis la sloganon "SERVO AL VI". Tio oftigis pluapaŝe la aktivadon servan al la popolamasoj. En la nuna tempo, kiam la komercaj servoj estas malmultaj, tio estas bonakceptata kaj laŭdata de la loĝantoj. En malpli ol unu jaro, junulaj servaj taĉmentoj rapide aperis, kiel bambuido post printempa pluvo, en multaj fabrikoj, lernejoj kaj institucioj.

Nun en la urbo Shanghai troviĝas ĝenerale jenaj trispecoj de junulaj servaj taĉmentoj:

1) Servaj taĉmentoj konsistantaj el junaj laboristoj de fabrikoj, kies membroj plejparte riparas la produktaĵojn de sia fabriko por uzantoj, ekzemple ripari biciklojn, kudromaŝinojn, horloĝojn, fontoplumojn, familiajn elektrajn instrumentojn k. a.

2) Servaj taĉmentoj konsistantaj el gejunuloj laŭ ilia ŝatokupo kaj faka tekniko. Ili servas ĉefe al laboristoj kaj oficistoj de siaj laboraj unuoj, ekzemple hartondi, tajli, foti, munti akvan aŭ elektran mezurilon, brodi, triki kaj ripari ĉiutagajn bezonaĵojn. Tiaj servaj taĉmentoj konsistigas plejparton de la nunaj servaj taĉmentoj.

3) Servaj taĉmentoj sen fiksa taskoj, ili servas al la loĝantoj ĉiam ajn, ekzemple ripari do-

Membroj de la Junula Serva Taĉmento de la Shanghai-a Tria Kudromaŝina Fabriko senpage riparas kudromaŝinon por uzanto.



mon, kalki muron, dragi kloakon, lavi laborvestojn. Iuj eĉ venas al la fervoja stacio, havenoj kaj ĉefaj stratoj por helpi maljunulojn kaj infanojn kaj zorgi trafikant sekurecon.

En la aktivado "SERVO AL VI", la gejunuloj disvolvis sian saĝon kaj talenton, kaj hardis sian spiriton kaj iom post iom starigis al si la penson servi al la popolo.

Yuan Dingfa, elektristo de la movforta laborejo de la Shanghai-a 3-a Bicikla Fabriko, estas unu el iniciatintoj de la junulaj servaj taĉmentoj. Dum la lasta pli ol unu jaro, li entuziasme okupiĝis pri socia servado, ellernis dek metiartojn. Li povas fari laboron de lignajisto, masonisto, lakisto, ladisto k. a. Li diris: "En servado al loĝantoj mi trovis ĝojon."

Kompreneble, komence ne ĉiuj gejunuloj volis partopreni en serva taĉmento. Sperta lakisto Eta Liu komence rifuzis partopreni en tia taĉmento, malgraŭ plurfoja persvado de taĉmentestro Yuan Dingfa. Ĉar ŝajnis al li, ke li ne bezonas alies helpon, tial li ne devis helpi nekonatojn. Sed, en septembro de la lasta jaro, kiam lia pliaĝa frato estis baldaŭ edziĝonta, li fariĝis malĝoja pro tio, ke li ne povas tuj trovi taŭgan personon por helpi lian fraton munti elektrajn lampojn kaj instrumentojn por la geedziĝa ĉambro, kaj ke sen sufiĉaj lamplumoj la hele lakitaj mebloj ne brilos. Pro tio li devis peti helpon de Yuan Dingfa. La lasta venigis du elektristojn de sia junula serva taĉmento kaj finis la muntadon en sinsekvaj tri vesperoj. Neniu el ili prenis vespermanĝon en lia hejmo. Li eĉ ne sciis la nomojn de du el

ili. Tio multe kortuŝis lin. La sekvantan tagon li venis al Yuan Dingfa kaj diris: "Mi bone komprenas, ke oni ne devas nur prizorgi sin mem sed devas helpi unu alian, ankaŭ mi volas partopreni en la junula serva taĉmento." Nur en kelkaj monatoj, Eta Liu lakis por aliaj 17 meblojn en libera tempo.

Tiamaniere la junulaj servaj taĉmentoj grandiĝis senĉese. Eĉ tiuj junuloj, kiuj iam suriris eraran vojon, fariĝis iliaj aktivuloj.

Juna laboristo Eta Qiao iam faris ŝteladon kaj estis kondamnita, tio igis lin humiliĝa kaj malbonhumora. Informiĝinte ke li scipovas tajli, la KJL-organizo de la fabriko persvadis lin por partopreni en la serva taĉmento. La invito multe ĝojigis Etan Qiao. Lia tajlado tuj ricevis laŭdojn de multaj homoj. De

tiam li diligente studis tajladon en libera tempo. Iun tagon, iu oficisto volis kudri tajlitajn vestojn, tamen al la tajlora grupo mankis kudromaŝino. Eta Qiao tuj revenis al sia hejmo kaj transportis sian kudromaŝinon al la fabriko. Tiu laboristo, kiu pasinte proprigis al si ŝtatajn objektojn, hodiaŭ volonte pruntedonis sian kudromaŝinon por servi al popolamasoj. Kiam oni laŭdis lin, li diris: "Pasintecce mi opiniis monon pli grava ol la vivo, sed nun mi komprenas ke, se nur oni faras servon al aliaj, la vivo estas signifoplena."

La junula serva taĉmento entuziasme helpas per sia servo loĝantojn en ilia vivo, ili ne nur plibonigas rilaton inter la homoj sed ankaŭ la socian moralon.

En la unuaj du monatoj de la kuranta jaro, pli ol 400 junulaj servaj taĉmentoj de la malpeza

Membroj de la Junula Serva Taĉmento de la Shanghai-a Fontopluma Kompanio riparas fontoplumojn kaj globkrajonojn en dimanĉo por uzantoj.



industria branĉo de Shanghai riparis por loĝantoj 65,000 diversajn objektojn, inter ili troviĝas pli ol 2,500 bicikloj, pli ol 5,000 brakhorloĝoj, 400 kudromaŝinoj, 4,800 skribiloj. . . Tio ja estas granda helpo al la loĝantoj.

Iu maljuna laboristo ofte ne povis bone dormi en sia hejmo pro ekstera bruo. Li volis muntis sonizolan tabulon sur la muro. Li jam pretigis la materialon, sed ankoraŭ ne trovis taŭgan helpanton por tio. Informiĝinte pri tio, junuloj de serva taĉmento kun tagmanĝaĵo venis al lia hejmo en libera tempo kaj muntis sonizolan tabulon. Estis alia maljuna laboristo Sheng, kies akvotubo subite difektiĝis kaj akvo senĉese elfluis. Aŭdinte tion du junuloj de serva taĉmento en proksimo tuj venis al li ripari la akvotubon. Kiam la akvotubo estis riparita kaj akvomezurilo estis muntita, jam

estis profunda nokto. Majstro Sheng diris emocie: "Pasinte mi havis malĝustan opinion pri ĝejnuloj, sed la fakto pruvis ke mi eraris. Mi jam estas pli ol-50-jara. Se vi fidus min, do akceptu min kiel vian maljunan kolegon!" Nun la junuloj varme nomas lin maljuna konsilanto de la serva taĉmento.

Iuj junulaj servaj taĉmentoj konkure faris servon al blinduloj, surduloj kaj mutuloj kaj maljunuloj de maljunulaj domoj per hartondado, vestoflikado, lavado de litkovriiloj kaj matracoj kaj prezentado de programeroj. Multaj maljunuloj ne nur ĝuis oportunecon donitan de la taĉmentoj, sed ankaŭ vidis en ili esperon de la patrio.

Kun pliiĝo kaj perfektigo de la socialisma serva reto, la servaj taĉmentoj eble malaperos. Tamen ilia spirito zorgi kaj servi aliajn estos heredata kaj disvolvata.



KIAM mi unuafoje vidis Zhu Meili, ŝi estis ludanta la baleton "Cigna Lago" en teatro.

La purpura kurteno estis malfermita malrapide. La scenejo estis dekoraciita per densa arbaro, kaj apud la lago staris ruino de antikva kastelo. Aro da brile blankaj cignoj naĝis sur la ondanta lago kaj en la ebriga melodio de majstro Ĉajkovskij gracie ekdancis tri grandaj cignoj. Kaj la fronta dancistino ja estis Zhu Meili.

Ŝi estis svelta kaj, gracia, ŝia vizaĝo kun eleganta nazo, brilaj kaj ĉarmaj grandaj okuloj, ovalaj vangoj estis tre ĉarma. Sed kiam mi informiĝis pri ŝia amokazaĵo, mi sentis, ke ŝia animo estas multe pli bela!

Ni komencu la historion okazintan antaŭ 4 jaroj.

Estis dimanĉo. Zhu Meili estis kalkanta sian ĉambron por geedziĝo, ĉar baldaŭ geedziĝos ŝi kaj Wang Danyang, teknikisto laboranta en fabriko de Shanghai. Sed kvazaŭ tondro en serena tago, ŝin atingis terura informo: "Wang Danyang estas brulvundita en akcidento!" Ŝi haste rapidegis al hospitalo. . .

Ŝi jam tute ne povis rekonii, ke la homo kuŝanta en la hospitala lito estas ŝia fianĉo. Lia vizaĝo terure ŝveliĝis de incendio kaj toksigo de benzino. Liaj brovoj kaj kapharoj estis forbruligitaj, kaj la grave vunditaj manoj kon-



Membroj de la Junula Serva Taĉmento de la Shanghai-a Vestata Kompanio servas al klientoj per tajlado en la parko Fuxing en dimanĉo.

LA AMO DE "CIGNO"

trahigis. La vidaĵo ŝiris al ŝi la koron. En la tagoj de turmentaj suferoj, ŝi havis nur unu esperon: fari ĉion eblan por ke li resaniĝu rapide. Ŝi vizitis brulvundajn fakojn de preskaŭ ĉiuj grandaj hospitaloj de Shanghai. Escepte de partopreno de la baletaj prezentado kaj ekzercado, ŝi ĉiam restis ĉe Wang Danyang por flegi lin.

De ŝia baleta ensemblo ĝis la hospitalo troviĝis longa vojo, sed ŝi penadis unu plenan jaron, ĉu en frosta vintro aŭ ardanta somero.

Post la lasta operacio la bandaĝo sur la vizaĝo de Wang estis malvolvita. Ŝi ekmiregis: la vizaĝo, antaŭe bone konata de ŝi, nun estas plena de cikatroj, la okuloj strabiĝis, la buŝo oblikviĝis kaj sur la mentono elkreskis malbelaj tuberetoj, kaj la manoj ankoraŭ kontrahis kiel antaŭe. Ŝi neniam atendis, ke ŝia malfacilega klopodado rezultigis tian rekompencan. Ŝi kvanzaŭ estus surverŝita per malvarma akvo. Ŝajne Wang Danyang legis ion en ŝia okulesprimo palpebrumon daŭranta, kaj demandis: "Ĉu tre terure aspektas mia vizaĝo?" "Ne, ne tre," la junulino pene detenis sian sintenon.

Wang Danyang elhospitaliĝis, sed li ankoraŭ devis ĉiutage iri, en la akompano de Zhu, al la hospitalo por ricevi kuracon. La survojaj preterpasantoj tre



Post sia ekzercado ŝi venis al Wang Danyang por flegi lin.

miris, ke tiu ĉi malbela junulo estas akompanata de tre bela knabino. Iuj el ŝiaj konatoj admonis ŝin: "Ne perdu la prudenton. Vi estas fraŭlino kaj rajtas rompi kun li."

Estis vere severa provo. "Tute aliformiĝis lia vizaĝo, kripliĝis la du manoj kaj estos sinsekvaj malfaciloj imageblaj. Ĉu mi edziniĝu al li? Pripensu, tio estas afero por la tuta vivo. Ho ve, kion fari?" ŝi dolore cerbumadis en profunda nokto kaj falis en kontraŭdirojn.

Wang Danyang estis junulo kun ordinara aspekto, el ordinara familio. Antaŭ 6 jaroj ŝi konatiĝis kun li kaj tre adoris lin pro liaj vastaj scioj, forta esplorejo de la fakaj scioj, en-

tuziasmo kaj sincereco. Zhu invititis lin rigardi ŝian ludadon de la baletoj "Ruĝa Virina Taĉmento" kaj li rigardis kun granda atento. Poste li senkaŝe diris al ŝi siajn opiniojn pri la ludado. Li diris, ke Zhu ne bone esprimis la ĝojon, melankolion, doloron, malamon kaj aspiron de la heroino Wu Qinghua. Li multfoje akompanis ŝin en rigardo de la samtitola filmo, pruntis por ŝi diversajn literaturajn verkojn, por ke ŝi altigu sian literaturan memkulturon kaj sian baletan arton. En tiuj jaroj ili helpis kaj prizorgis unu la alian en la vivo kaj laboro. Oni volis rekomendi al Zhu fraŭlon pli riĉan kaj pli plaĉan ol Wang, sed ŝi danke rifuzis tion. Ŝi amis Wang, precipe lian kvaliton.



Revenante hejmen en nokto, ŝi meditas.

“Nun tute misformiĝis lia vizaĝo, kaj kripliĝis la manoj. Sed ĉu mi devas perfidi la amon elkulturitan en multaj jaroj? Ne, mi ne devas tiel agi.” Ŝi riproĉis sian egoisman ideon kaj pensis, ke ŝi devas pli ami lin kaj neniel devas pikdolori al li la koron, kiam li troviĝas en granda ĉagrenno.

Serena mieno denove aperis sur ŝia vizaĝo. Ŝi ankoraŭ akompanis lin al la hospitalo en gaja humoro. Ŝi ofte masaĝis liajn rigidajn manojn, por ke la manoj reakiru la funkciojn.

Zhu Meili estis veturonta eksterlanden por turneo. Ŝi venis adiaŭi lin kaj konsolis, ke li bone ripozu. Ŝi promesis al li, ke ŝi skribos unue al li, post kiam ŝi atingos la celokon.

Rigardante sian amatinon, Wang eklarmis. Li amas ŝin, respektas ŝin kaj timas apartiĝi kun ŝi. Finfine li elverŝis vortojn longe kaŝitajn en la koro: “Vi donis al mi grandan konsolon. Pro mi vi suferis multe! Mi komprenas, ke mi multege malhelpos vin en viaj vivo kaj kariero, se mi vivos kune kun vi . . .”

Aŭskultante lin, ŝi falis en mediton. Sed ŝi senhezite montris al li sian koron: “Vi vundiĝis en laboro, sed via spirito estas nobla. Mi ne povas vivi sen vi. Ni neniam disiĝos!”

Ilia sankta amo multe kortuŝis la kuracistojn. Iu fama plastika ĥirurgo decidis fari al li operacion. Dank’ al la zorgema operacio, multe glatiĝis lia vizaĝo, kaj iom post iom normaligiĝis la buŝo kaj la okuloj.

En oktobro de 1977, la geamantoj geedziĝis post kiam Zhu Meili revenis de turneo en Francio kaj Kanado. Oni diris admire, ke ŝi fidelas al la amo kiel la cigno.

Ŝajne jam estas la fino de la historio. Sed oni, precipe niaj legantoj, volus informiĝi, kiel ili vivas post la geedziĝo.

Antaŭ nelonge, en iu dimanĉa vespero, mi vizitis la geedzojn en ilia hejmo. La ĉambro ne estis vasta, sed impresis per komforteco kaj bonordeco. La geedzoj estis ĵus revenintaj de gastado kune kun sia filineto tre aminda kaj vigla.

Ni ekbabilis libere pri ĉiutagaj bagateloj. Zhu diris al mi, ke ŝi estas tre okupata pri la dom-

mastrumado. Ĉiutage ŝi devas helpi Wang vesti kaj lavi sin, poste ŝi iras al bazaro por aĉeti legomojn kaj almanĝaĵojn. Reveninte de la bazaro, ŝi preparas matenmanĝon. Vespere ŝi lavas al Wang la piedojn kaj enlitigas lin. Kaj cetere, ŝi devas lavi la vestojn kaj purigi la ĉambrom. Kiam ŝi devas iri aliloken por turneo, ŝi aranĝas ĉion en bonordo, pretigas por li sufiĉajn vestojn kaj metas ilin tuj apud lia lito. Malgraŭ la okupata dommastrumado, ŝi neniam forestis de sia ekzercado kaj ludado. Vivante kun la edzo kaj filineto ŝi ankoraŭ restas grava rolulo de la baleta ensemblo.

Siaj senmankaj prizorgoj varmigas al Wang la koron. Li obstine ekzercas siajn rigidajn manojn. Kaj nun li jam povas mem manĝi per kulero. Li nun ankoraŭ ne povas labori, sed li utiligas ĉiun tempon por memlerni fremdan lingvon kaj legi scienc teknikajn librojn por pli bone labori estonte.

Montrante Zhu, Wang Danyang diris al mi: “Dank’ al ŝi, mi vivas en kontenteco.” Kaj Zhu diris: “Kvankam mi estas tre okupata, tamen mi sentas min feliĉa kaj la vivon dolĉa.”



Feliĉa familio

SURMARA

FIŜISTA VILAĜO

F RUSOMERE de la kuranta jaro, en la sezono de kaptado de sepioj kaj ŝtonkapaj fiŝoj, mi vojaĝis al la Luomen-a Popolkomunumo sur Zhoushan-insulo.

Tiu insulo en nordorienta Zhejiang (Ĝegiang)-provinco, sur la Orienta Ĉina Maro ekster Hangzhou (Hangĝoŭ)-golfo, kune kun aliaj pli ol 400 insuloj kaj insuletoj konsistigas Zhoushan-insularon, la plej grandan en Ĉinio. Tiu loko ankaŭ estas la plej fama fiŝejo de Ĉinio.

La Luomen-a Popolkomunumo konsistas el kvar produktaj brigadoj, kiuj havas 1,864 fiŝistajn familiojn kun 7,701 loĝantoj. La Luomen-a Produkta Brigado estas la plej granda el ili. Ĝi havas 1,258 familiojn kun 5,050 loĝantoj. Ĝi dividiĝis en kvar produktajn taĉmentojn.

La Luomen-a Produkta Brigado situas en la pitoreska Luomen-vilaĝo, ĉe kies orienta rando staras montoj. Norde de la vilaĝo etendiĝas maro, en la suda parto estas ebenaj kampoj

kaj en la okcidenta troviĝas strando. Ankaŭ la gvida organo de la komunumo lokiĝas en tiu vilaĝo.

Same kiel multaj aliaj fiŝkaptaj komunumoj de Ĉinio, la Luomen-a Popolkomunumo praktikas sistemon kun produktaj brigado kiel baza kalkula unuo. Konkrete dirate, la brigado posedas la produktajn rimedojn. En la kadro de la produktaj planoj difinita de la komunumo, la brigado rajtas mem organizi produktadon, respondi pri profitoj aŭ perdoj, decidi distribuon inter la komunumanoj kaj aranĝi ilian vivon. La fiŝkaptado postulas grandan investon kaj altan produktokoston kaj povas esti facile influata de meteoro kaj maro, ĝi devas posedi havenon, riparon de ŝipo kaj reto kaj prilaboradon de fiŝoj, kaj krome, je trafo de ŝipodetruiĝo aŭ homo-droniĝo en maro, la fiŝistoj bezonas kolektivajn interhelpon, tial fiŝkaptado postulas pli grandan kunlaboron ol la agrikultura produktado.

Antaŭ fiŝado en maro



La produkta taĉmento zorgas nur pri laborfortoj, ŝipoj, materialoj kaj instrumentoj.

NOVA PAŜO

De la 50-aj jaroj la produktaj brigadoj de la Luomen-a Popolkomunumo fondis fabrikojn por fiŝkaptado bezono. Ekz-e, la Luomen-a Produkta Brigado havas ŝip-riparejon, mekanikan fabrikon, fiŝ-sekigejon, reto-farejon, fabrikon de brikoj kaj tegoloj, fabrikon de konstruaj blokoj, konstruan taĉmenton kaj kokobredejon, kiuj estas utilaj al la fiŝkaptado kaj la vivo de la komunumanoj kaj pliigas enspezon de la brigado.

Julie de 1979 la Luomen-a Popolkomunumo fondis la unuan fiŝkaptan, industrian kaj komercan kombinumon de Zhoushan kaj tiel faris novan paŝon por disvolvi fiŝkaptadon.

Mi vizitis tiun kombinumon en rudimenta stato. Ĝi troviĝas apud maro, ĉe la norda fino de Luomen-vilaĝo. Antaŭe tiu loko estis marbordo. La komunumanoj tie kreis artan ebenaĵon kun areo de 35,000 kvadrataj metroj per hakitaj ŝtonoj kaj tero. Nun 5-etaĝa fridiga staplo aperis tuj apud monto. En la teretaĝo estas laborejo por klasifiki fiŝojn, kie dekoj da junaj virinoj streĉe klasifikas freŝajn fiŝojn, lavas, enkestigas, pesas kaj poste portas ilin en rapidfridigan tenejon. La dua kaj tria etaĝoj estas fridigaj tenejoj, kiuj povas enteni 800 tunojn da fiŝoj. Tiutage mi vidis, ke oni pakas blokojn de fridigitaj grandaj ŝtonkapaj fiŝoj, malgrandaj ŝarkoj, platfiŝoj k. a. por baldaŭ transporti ilin al Beijing (Pekino). La kvara etaĝo povas konservi mil tunojn da glacio. En la kvina etaĝo

estas glacifarejo, kiu povas elfari 60 tunojn da glacio en ĉiu diurno. La motorizitaj veŝipoj de la komunumo malhavas fridigajn ekipaĵojn kaj nur kunportas artan glacieron por konservi la kaptitajn fiŝojn. La glacifarejo povas plenumi la bezonon de la fiŝŝipoj de la komunumo.

Antaŭ la fondo de la kombinumo, kaptinte fiŝojn la fiŝŝipoj de la produktaj brigadoj de la Luomen-a Popolkomunumo devis tuj serĉi transportajn ŝipojn

de la ŝtata fiŝkompanio por vendo. Kelkfoje la freŝaj fiŝoj longe kuŝis en la holdo kaj multaj el ili putriĝis kaj oni devis ŝuti ilin en la maron. Nun la fiŝkaptaj ŝipoj de la kombinumo estas provizitaj per siaj propraj transportaj ŝipoj, kiuj povas ĝustatempe reporti la kaptitajn fiŝojn al la fridiga staplejo. Kontraŭ la freŝaj fiŝoj oni pagas je alta prezo, kaj tiel la kombinumo enspezas pli multe. Laŭ la plano difinita de la ŝtato, la kombinumo povas

vendi fiŝojn al koncernaj organizoj, kio reduktis perdojn kaj kostojn dum la perado.

La kombinumo estas entrepreno kune administrata de la komunumo kaj la brigadoj. La profitoj dividiĝas inter ili proporcie. La parto ricevita de la brigadoj estos distribuita samjare al la brigadanoj. Kontisto Jiang donis al mi jenajn ciferojn de la Luomen-a Popolkomunumo ĉirkaŭ la fondiĝo de la kombinumo:

Jaro	Totala produktokvanto de akvoproduktaj (tunoj)	Totala enspezo (juanoj)	Imposta sumo al la ŝtata kaso (juanoj)	Kolektiva akumulo (juanoj)	Totala sumo al la komunumanoj (juanoj)	Enspezo de ĉiu laborulo (juanoj)
1977	16,070.5	4,494,500	121,400	423,200	1,348,800	625
1978	21,412	6,114,700	180,300	860,300	1,980,600	890
1979	20,208.5	8,975,100	231,100	2,051,900	3,452,500	1,580
1980	17,639.9	9,161,100	232,200	1,747,400	3,738,800	1,703

Kvankam la kaptokvanto malleviĝis pro tio, ke dum la lastaj du jaroj la ŝtato difinis la tempon kaj regionojn de malperme-

sita fiŝado por protekti la akvoproduktajn riĉfontojn, tamen la supraj ciferoj klare montras, ke la kombinumo kun mallonga

historio alportis profitojn al la ŝtato, kolektivo kaj fiŝistoj.

La kombinumo donis ekzemplon por disvolviĝo de la kolektiva fiŝkaptado, kaj havigis laborojn al iuj homoj, precipe virinoj. Nun en Zhoushan-regiono stariĝis 14 tiaj kombinumoj.

La fridiga staplejo de fiŝkapta kombinumo



PARTIA SEKRETARIO ZHAO YUNZAI

Zhao Yunzai, sekretario de la komunuma partia komitato, estas unu el la fervoraj fondintoj de la kombinumo. Zhao, 60-jara, estas plena de energio. Ekde sia 16-jara aĝo li fiŝkaptadis surmare por kapitalisto. Post travivado de ĉiaj suferoj, li fariĝis lertulo de fiŝkaptado. En la komenca periodo post la Liberiĝo li organizis interhelpan

grupon en Luomen-vilaĝo, kaj poste li fariĝis unu el la pioniroj en fondo de kooperativo kaj popolkomunumo.

La Tria Plena Sesio de la 11-a Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio okazinta en 1978 alvokis, ke la tuta Partio turnu sian ĉefan laboron al la socialisma moderniga konstruado. Kiel sekretario, maljuna Zhao estas ofte okupata de la demando: Kion la Luomen-a Popolkomunumo faru, kiam la ŝtato faros modernigan konstruadon kaj Zhoushan-insularo fariĝos fiŝkaptabazo? En la pasintaj 30 jaroj, por sia fiŝkaptado la Luomen-a Popolkomunumo anstataŭigis la lignajn velŝipojn per motoraj kaj aplikis telegvidilojn kaj poziciatorojn, serĉatorojn kaj aliajn aparatojn, tiel ke la fiŝkaptabazo kreskis 10-20-oble pli multe ol antaŭe. Tamen la sola fiŝkaptado ankoraŭ ne povis disvolvi la produktajn fortojn. Post diskutado la komunuma partia komitato proponis fondi fiŝkaptan, industrian kaj komercan kombinon, kiu entreprenos fiŝadon, transportadon, prilaboradon kaj vendon de akvoproduktadoj per sia propra forto. Kaj baldaŭ la propono ricevis aprobon de la supera instanco.

Maljuna Zhao ne kontentiĝas pri sia sukceso. Montrante vastan terpecon antaŭ la fridiga staplejo, li diris al mi: “Ĉi tie ni planas konstrui alian fridigan tenejon kun kapacito de mil tunoj, tie ni tuj konstruos preparaĵojn de fiŝa pulvoro, pli poste ni disvolvigos iom post iom produktadon de sekigita fiŝfibro, fiŝpecetoj kaj fiŝbuloj kaj ladfiŝaĵojn. Venontjare ni konstruos profundan dokon. En la lastaj du jaroj nia komunumo kaj ĝiaj

brigadoj akumulis pli multe, ni ne devas kontentiĝi pri proksimamara fiŝkaptado per motoraj velŝipoj. Ni volas havigi al ni dizelŝipojn por fiŝkapti malproksime.”

La disvolviĝo de la ekonomio kreis materialan bazon por plibonigi la vivon de la komunumanoj. Maljuna Zhao diris humure: “Ĉi-jare plimultiĝis duspecaj aferoj en nia komunumo. Unue, pli da junaj paroj geedziĝis. Depost la Novjara Tago 260 paroj sin registris por geedziĝo. Due, aperis pli da domoj. La Luomen-a Produkta Brigado estas konstruanta ĉe la orienta deklivo du-etaĝajn domojn kun areo de 4,200 kvadrataj metroj. Ankaŭ nemalmultaj komunumanoj malkonstruis siajn malnovajn domojn por konstrui novajn. Ni taksas, ke oni konstruos domojn kun areo de 6,000 kvadrataj metroj en la venontaj monatoj de la kuranta jaro.”

Sed maljuna Zhao ankoraŭ loĝas, kiel antaŭe, en domo kun du ĉambroj ekde la Liberiĝo. Zhao estas fama fiŝisto. Li nun povus ricevi ĉiujare almenaŭ 2,200 juanojn kiel ordinara fiŝkaptisto. Sed kiel ŝtata oficisto, li enspezis 72 juanojn ĉiumonate, inkluzive la salajron de 57 juanoj kaj la subvencion. “Eble via edzino plendus pri tio!” diris mi ŝerce. “Ni, kadroj, estas nur servistoj de la popolo kaj volas ke la komunumanoj riĉiĝu la unuaj,” ridis maljuna Zhao.

VETERANA FIŜISTO XU ASHAN

La 51-jara fiŝisto Xu Ashan estas vicestro de la Luomen-a Produkta Brigado. Li estas honesta, mezstatura kaj vizaĝbruna. En la sinsekvaj pasintaj jaroj li estis elektita kiel labormodelo

de Zhoushan-regiono. Mi petis lin rakonti al mi iom pri si mem, sed li diris tre malmulte.

Li naskiĝis en fiŝista familio. En sia 10-jara aĝo li paŝtis bonon por bienulo. Kiam li estis 18-jara, li komencis fiŝkapti por kapitalisto. En 1954 la ŝtato sendis likvidi analfabetecon de la fiŝistoj. Dank’ al tio li scipovis iom legi, kaj nun jam ĵurnalon. En 1956, kiam la brigado aĉetis unuafoje du motorajn velŝipojn, li fariĝis vicŝipestro de unu el ili post trejnado. En 1961 li estis elektita kiel vicbrigadestro. En ĉiu fiŝkaptabazozono li gvidis motorajn velŝipojn en surmara fiŝkaptado. Li aparte rimarkigis al mi, ke ĉi-jare li estis elektita kiel avangarda fiŝisto anstataŭ kiel labormodelo. Ĉar en la fiŝkaptabazozono de la lasta vintro kvar el la de li gvidataj 36 paroj da ŝipoj fiŝkaptis en malpermesita regiono kaj estis monpunitaj. Li ne sciis la malobservon antaŭ la okaziĝo, tamen, kiel gvidanto de la ŝiparo, li devis prirespondi pri tio. Ekde tiam li ofte rimarkigis la fiŝistojn, ke ili memkonscie observu la regulojn difinitajn de la ŝtato pri protekto de la akvoproduktaj riĉfontoj.

Poste mi vidis Shi Youhui, sekretarion de la ĝenerala partia filio de la brigado. Li menciis Xu Ashan dum nia interparolo:

“En la lastaj dekelkaj jaroj liaj ŝipoj ĉiujare fiŝkaptis plej multe en la komunumo kaj ankaŭ la fiŝkaptabazo de lia ŝipoparo troviĝis en la unua vico de la pli ol mil paroj da motoraj velŝipoj de Zhoushan-fiŝejo. Kvankam li ne estis multe klerigita, tamen li diligente lernis sperton de aliaj ŝipestroj kaj multe fiŝadis surmare, tial li

bone konas la fluson kaj malfluson de la suda kaj norda fiŝejoj, la leĝon de la fiŝa naĝado kaj manipulado de fiŝretoj. Ankaŭ en komplika situacio de tajdo li povas kapti fiŝojn.

“Li suferas de kolecistito. En la kapta sezono de la vintro de 1976, li gvidis sian ŝiparon por fiŝado en Zhoushan-fiŝejo. La malsano lin denove atakis kaj akre doloris al li. La rondira medicina trupo mildigis lian doloron per injekto. Tuj poste li denove sin jetis en fiŝkaptadon. Li havas altan prestiĝon inter la fiŝistoj, tiuj sekvas lin kaj obeas lian ordonon.”

DU FIŜISTAJ FAMILIOJ

La novgeedzoj Zhu Chunming kaj Zhang Shengna havas duĉambran domon kun areo de ĉ. 40 kvadrataj metroj. La hela kaj pura domo donas belon kaj komforton kaj montras la saĝon kaj diligentecon de la mastrino.

Zhu havas 26 jarojn. Kiam li estis 18-jara, li jam komencis fiŝkapti surmare. En sia 21-jara aĝo li fariĝis rudristo. La fiŝistoj de tiu komunumo ricevas 1-15 laborpontojn laŭ sia servo-daŭro kaj kapableco. Kalkulate

laŭ 10 poentoj, Zhu ricevis 2,200 juanojn pasintjare. Antaŭe Zhang estis tornistino de agrikulturila fabriko. Edziniĝinte en Luomen, ŝi forlasis la laboron en la fabriko pro longa distanco. La monata manĝkosto por la edzo estas 12 juanoj, kaj krome li bezonas 20 juanojn kiel poŝmonon por fumado, drinkado kaj etmanĝado. La mastrino elspezas ĉiumonate ĉ. 40 juanojn por la familia vivo. Videble, ili vivas komforte.

Ankaŭ la patro de Zhu Chunming estas fiŝisto. La patro enspezas pli multe ol sia filo, tamen la filo donas al la gepatroj ĉ. 400 juanojn ĉiujare. En Ĉinio oni havas devon vivteni siajn gepatrojn kaj tio estas rigardata kiel tradicia virto. Post sia edziĝo la junuloj de tiu vilaĝo donas al siaj gepatroj monsumon pli aŭ malpli multe ĝenerale. Se iu ne volas tion fari, la brigado devigas lin tiel fari.

Vespere, kiam mi iris en la domon de Zhang Wansheng, li kaj liaj familianoj estis vespermanĝantaj. Zhang, 71-jara fiŝisto, estis drinkanta sole. La tablo estis kovrata de kvin pla-

doj kaj unu supo. Antaŭ tri jaroj la maljunulo emeritiĝis. Plejparto de la fiŝkaptaj komunumoj en Zhoushan-regiono praktikas la sistemon, ke la fiŝistoj povas emeritiĝi atinginte la aĝon de 60 jaroj. La monata pensio en la Luomen-a Produkta Brigado estas inter 18 kaj 30 juanoj. Kaj Zhang Wansheng ricevas 28 juanojn ĉiumonate. Krome, liaj du filoj monhelpas lin pli-malpli multe. La gemaljunuloj ĝuas bonan vivon.

La maljunulo vivas kune kun la familio de sia unua filo, en ter-etaĝa domo el kvar ĉambroj. Antaŭ la domo estas korto ĉirkaŭata per heĝo. La maljunulo invitis min sidiĝi en la malvarmeta korto por babili kun li. En la aĝo de 16 jaroj li komencis fiŝadon surmare. Li travivis siajn 52 jarojn en fiŝado. La nova kaj malnova socioj impresis lin tute malsame. Tie cirkulas jena popolokanto:

*Minacas ŝtormo en la tago
kaj nokte la pirata plago.
Ni sklave penas en ŝipeto,
ondegoj — nia sarkofago.*

La maljunulo diris, ke ĝi fidele priskribas la pasintan vivon de la fiŝistoj. Hodiaŭ ili fariĝis mastroj de tiu loko. Pli boniĝis tagon post tago iliaj labor- kaj viv-kondiĉoj. Je malsaniĝo ili povas ricevi kuracon en la brigada koopera medicina servo. 75% de la kurackosto estas pagata de la brigado. La brigado donas ankaŭ subvencion al la familio de mortinto. Zhang Wansheng, laboreginta dum la tuta vivo, nun vivas siajn lastajn jarojn senzorge. Je la adiaŭo mi premis al li la dikajn manojn, dezirante al li longan vivon. Li ekridis de ĝojo.

Familio de fiŝkaptisto



VIZAGĜE AL EKSTERORDINARA INUNDO

ANTAŬ nelonge mi vizitis Sichuan (Siĉuan)-provincon plagitan de inundego.

En julio, pluvegis ĝenerale en tiu provinco. La plej alta nivelo de la akvo en la supra parto de Changjiang (Jangzi)-rivero kun siaj tri grandaj branĉoj Minjiang, Tuojiang kaj Jialing atingis 194.41 metrojn, t.e. nur iom malpli alte ol tiu en la jaro 1892; la vasta areo de pli ol 38,000 kvadrataj kilometroj de ĉ. 100 gubernioj kaj urboj de la okcidenta, meza, norda kaj sudorienta partoj de tiu provinco estis plagita de superakvo; 753 personoj mortis kaj 1,700,000 personoj perdis sian hejmon. La trunkaj fervojaj linioj de Chengdu ĝis Kunming, de Chengdu ĝis Chongqing kaj de Chengdu ĝis Baoji kaj pli ol 80 aŭtovojoj estis rompita, sekve de kio la trafikado kaj PTT-servo inter la provinco kaj aliaj partoj de la lando kaj interne de ĝi estis preskaŭ tute paralizitaj.

Nun jam forpasis la plej severa tempo. Post trapaso de la ĵus finkonstruita baraĵo de Gezouba, la furioza torento iom mildiĝis.

UNU KOMPARTIA SEKRETA- RIO KAJ DU GUBERNIESTROJ

En la grava urbo Nanchong en la norda parto de la provinco

mi intervjuis Liu Chunfu, la unuan sekretarion de la Subprovinca Kompartia Komitato de Nanchong. Li maldormadis 40 horojn en sinsekvo dum sia direktado de la savado de la popolamaso trafita de la inundo. Dum nia interparolo li tamen nenion menciis pri sia penado, kaj nur vigle rakontis al mi pri la klopodado de aliaj kadroj.

En la vilaĝo Xiazhongba de Peng'an-gubernio loĝis pli ol 1,700 kamparanoj. En la 23-a de julio la vilaĝon ĉirkaŭis superakvo post pluvego. Informiĝinte pri tio je la tria horo postnoktomeze, vicguberniestro Chen Yonggao tuj iris kune kun alia vicguberniestro Hu Zhizhang serĉi ŝipon por savi la vilaĝanojn ignorante sian vivon. Ili informiĝis, ke malplena varŝipo de 300 ĉevalpovo ankriĝis ĉe la bordo de Jialing-rivero, sed la superakvo ĝin forportis ien. Ili tuj komencis ĝin serĉi malfacile irante laŭ la kruta bordo en pluvego kaj ventego kun helpo de bambuaj bastonoj. Finfine ili trovis la ŝipon. Sed kiam ili veturigis la ŝipon al la vilaĝo, iuj vilaĝanoj ne volis forlasi sian karan domon. Kun brula maltrankvilo la vicguberniestroj vadis de domo al domo en akvo profunda ĝis la talio por persvadi ilin. Kiam ili transsendis la lastan grupon de

popolanoj al sekura loko, la akvo englutis la tutan vilaĝon.

UNUE LA ALIAJ EN SIA ZORGO

En la gubernio Jintang mi aŭdis jenan okazaĵon: Brigadestrino Huang Xiurong kaj ŝia frato laboristo Huang Yangqing loĝis apud rivero. En la 12-a de julio, la furioza inundakvo pelis la naŭ membrojn de iliaj familioj sur tegmentojn. La pluvo ankoraŭ daŭris kaj iliaj vivoj estis en danĝero. Subite alflosis granda ligna ŝipo kaj estis haltigita de branĉo de arbego. Huang Yangqing tuj saltis en la akvon kaj alvenigis ĝin per remado. Ĉiuj iliaj familioj enŝipiĝis, sed anstataŭ enŝipigi siajn posedaĵojn sur la tegmentoj, ili remis de tegmento al tegmento, de arbo al arbo, por savi la komunumanojn. Ili luktitis en la ŝtormo kvin tutajn horojn por transporti la unuan grupon de pli ol 70 homoj al sekura loko. Huang Xiurong kaj ŝia edzo Lai Jiulian restis kun la savitoj por ilin prizorgi, kaj Huang Yangqing denove forremis kun kelkaj fortaj volontuloj por helpi aliajn. Jam krepuskiĝis kaj ĉio fariĝis malklara en la pluvo. Ili kriadis en la mallumo kaj remis tien, kie aŭdiĝis voko aŭ vidiĝis lumeto. Senĉese ili penadis de la 3-a



Komunumanoj restarigas falintajn rizplantidojn en kampo plagita de inundo.

Rizkampo inundita de superakvo



ptm. de la 12-a ĝis la 8-a de la sekvanta mateno kaj savis pli ol 500 personojn en 17 horoj.

POTENCA FORTO

Dum mia vizitado al la plagitaj regionoj de la provinco, mi sciigis ke post la plago la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio kaj la Ŝtata Konsilantaro sendis telegramojn kaj specialan delegitaron por konsoli la plagitojn kaj samtempe asignis grandan sumon da helpmono kaj kolektis grandan kvanton da greno, vivbezonaĵoj kaj ekipaĵoj por helpi tiun provincon. Tan Qilong, la unua sekretario de la Kompartia Komitato de Sichuan-provinco, You Taizhong, komandanto de la Chengdu-a Milita Regiono, kaj aliaj iris respektive al Chengdu, Chongqing, Mianyang, Wen-

jiang, Neijiang, Nanchong kaj Yongchuan por fari inspektadon kaj direkti savan laboron. Pli ol dek mil oficiroj kaj soldatoj de lokaj garnizonaj trupoj de la Ĉina Popola Liberiga Armeo partoprenis en la batalo kontraŭ inundo kaj savado de la plagitoj. La popolo en la plagitaj distriktoj ricevis grandajn helpojn kaj kuraĝigojn. Potenca estis la detrua forto de la inundo, sed ankoraŭ pli potenca forto ŝprucis el la koroj de la popolanoj trafitaj de la malfeliĉo. Unu el la ekzemploj estas tiu de la Chongqing-a Prestinktura Fabriko apud la rivero Jialing.

Tiu fabriko portas la taskon prestinkтури pli ol duonon de la kvanto de kotonŝtofoj produktitaj de Sichuan-provinco. Antaŭ kelkaj tagoj, ĉiuj ĝiaj laborejoj, tenejoj kaj oficejoj dronis

en inundakvo. Ekde la posttagmezo de la 15-a de julio, la inundakvo penetranta en la fabrikon leviĝis rapide je 40 centimetroj en ĉiu horo. En tiu kriza momento, la kadroj kaj laboristoj alkuris kaj komencis enaŭtigi la tinkturobarelojn pezajn po 60 ĝis 80 kilogramoj per siaj brakoj kun tia rapideco, ke ili uzis nur 5 minutojn por pleni unu ŝarĝaŭton. Vespere de la 15-a, ili elsavis, sub helpo de la Popola Liberiga Armeo, pli ol mil pakojn da kotonŝtofo, 130 tunojn da tinkturo kaj 14 elektrajn maŝinojn. Matene de la 16-a, la inundakvo leviĝis je 1 metro en ĉiu horo. La du gigantaj transformatoroj, ne-transporteblaj el la domo, estis en danĝero; se ili trempigus en akvo, ili ne povus bone funkcii poste kaj tio multe malutilus al la produktado. En

TRI ARTEFARITAJ SATELITOJ ENORBITIĜIS PER UNU TRANSPORTA RAKETO

LA 20-an de septembro, Ĉinio unuafoje sukcesis elsendi trion da satelitoj por fizika esplorado en la spacon per unu transporta raketo. La artefaritaj satelitoj jam ĝuste enorbitiĝis kaj ĉiuj iliaj sistemoj funkcias normale kaj diversaj donitaĵoj pri esplorado kaj eksperimentado estas senĉese sendataj al la tero.

danĝero la laboristoj trovis saĝan solvon: ili pendigis per puliaroj la transformatorojn en la domo. Akvo jam penetris en la domon kaj maŝin-oleo flosanta sur ĝia surfaco malpurigis la vestojn de la laboristoj. Malgraŭ tio, ili restis tie en akvo profunda ĝis la brusto por observadi kaj iom post iom levadi la puliarojn, por ke la aparatoj teniĝu super la akvo. Kaj por teni la pli ol 300 kubmetrojn da ligno flosanta en la fabriko, laboristoj ilin kunfiksas per feraj hokoj kaj ligis al fiksaĵo per ŝnuregoj ignorante sian vivon. Ili gardadis la floson dum du tutaj diurnoj kaj lasis neniun lignopecon perdiĝi. Antaŭtagmeze de la 17-a, kiam la inundakvo komencis malleviĝi, la laboristoj ankoraŭ restis ĉe la loko. Ili sagace sin helpis per la forfluanta akvo por forlavi la sedimentan ŝlimon. Kiam forfluis la inundakvo, ili ankaŭ tute purigis la terenon invaditan de la superakvo, kaj baldaŭ rekomencis funkciigi la maŝinojn. La produktado estis rekomencita nur je malpli ol 30 horoj post la komenco de la inund-malleviĝo.

Oni diris, ke tio estas miraklo. Jes, vere miraklo. Kaj tio

ja ne estis unikajo en Chongqing.

Ankaŭ en Beibei de Chongqing mi vidis manifestiĝon de tiu forto pli potenca ol la naturo. Tiu loko estis serioze inundita. Kiam mi atingis ĝin, apud la ŝoseoj kaj sur la montdeklivoj oni estis intense laborantaj por forigi sedimentan ŝlimon kaj replanti en la detruitaj kampoj. Geknaboj petolis en la rivero, anasoj naĝis en lotuslagetoj, en iuj rizkampoj verde brilis la rizplantidoj ĵus replantitaj. Yu Hanqing, la urbestro, diris al mi en la aŭto, ke dum la inundo pli ol 70,000 tunoj da diversaj materialoj tenataj sur la kajoj estis savitaj, la ekipaĵoj de pli ol 3,000 laborejoj translokita kaj la ĉefaj ekipaĵoj de la fabrikoj plagitaj en tiu urbo sekurigitaj. Li diris al mi emocie: "Nia popolo povas elteni ĉiajn provojn. Ĝi entenas tre grandan aktivecon kaj vere havas potencon forton por konstrui novan vivon."

Veturinte norden de Chongqing malpli ol 4 horojn per aŭto laŭ la bordo de la rivero Jialing, mi atingis la gubernian urbon Hechuan, kie kunfluas la riveroj Jialing, Fujiang kaj Qujiang.

En tiu urbo mi denove vidis la heroismon de la popolo. En la 15-a, inundakvo de la tri torentegoj turnis la gubernion en maron, detruante la kampojn kaj domojn, kaj dekmiloj da popoloj estis pelitaj de akvo al altaĵoj kaj restis tie tri tagojn kaj noktojn. Kiam mi alvenis al ĝi, pasis apenaŭ unu semajno post la plago. Sur tegmentoj kaj telefonaj fosto ankoraŭ pendis herboj postlasitaj de la torenta inundakvo. Mi vidis proprakule la katastrofon alportitan de la diluvo. Sed mi vidis neniun popolanon en deprimateco. La guberniestro diris al mi, ke la registaro aparte asignis deĵorantojn por doni helpon al popoloj eventuale sin turnantaj al la registaro pro malfaciloj en vivo, sed ĝis nun neniun vizitis ilin tiucele.

NOVA VIVO EN KONSTRUADO

La gubernio Jintang estis la unua loko plagita, ĉar tie komenciĝas la torenta rivero Tuojiang. Ĝia gubernia urbo, kie kunfluas tri riveroj, estis pli ofte inundita. De la 12-a ĝis la 13-a de julio, la pluvokvanto en malpli ol 20 horoj superis

300 milimetrojn. Je la 3-a post-tagmeze de la 13-a, la tuta urbo jam dronis en akvo. La torentoj detruis kampojn kaj domojn kaj forportis meblojn kaj brutojn. Sed 19 horojn post la inundo, oni komencis denove liveri elektron, kaj 24 horojn poste tubekondukatan akvon. Mi alvenis al la gubernia urbo je foira tago kaj vidis, ke ambaŭflanke de stratoj oni vendas freŝajn legomojn, fabkazon kaj rostitajn kokojn. Mi eĉ vidis kamparanon kiu iris el magazeno kun du novaj bicikloj por ilin puŝi hejmen. Difektitaj domoj estis riparataj, novaj domoj estis en konstruado, kaj en iuj stratetoj oni faris sofojn, ŝrankojn kaj aliajn meblojn.

Laboranto de la Oficejo kontraŭ Inundo de la gubernio diris al mi, ke oni jam replantis batatojn sur pli ol dumil hektaroj da kampoj kaj legomojn sur pli ol 300 hektaroj. La akvo-

utiligaj konstruaĵoj, kiuj estas plej gravaj por la produktado kaj vivo, estas jam plene riparitaj.

La popolanoj en la plagitaj regionoj estas rekonstruantaj sian hejmon. Nun, plejparto de la amaso ankoraŭ loĝas en provizoraj simplaj kabanoj. Por helpi ilin rekonstrui loĝejojn, la registaro liveris al ili grandan kvanton da cemento, ligno kaj dikaj bambuoj. Kaj ankaŭ la popolamasoj faris ĉiajn eblojn por sin helpi en rekonstruado de la detruitaj domoj.

Survoje al Yongquan-komunumo, kamarado Guan, sekretario de la komunuma kompartia komitato, diris al mi, montrante novan domon ĉe la riverkurbiĝo, ke ĝi apartenas al vidvino Li Yuhua. En la plago, ŝiaj tera kabano kvarĉambra, porka stalo kaj kelkaj el ŝiaj mebloj estis detruitaj. Ŝi ne sciis kion fari kun siaj kvar junaj infanoj.

Tiam komunumanoj etendis al ŝi siajn varmajn manojn. Ili portis al ŝi siajn plej bonajn bambuojn, lignopecojn kaj tritik-pajlon kaj krome ankaŭ kolektis por ŝi 35,000 brikojn kaj betonajn tegolojn. En la dua tago post la retiriĝo de la akvo dekelkaj komunumanoj jam komencis masoni por ŝi novan domon. La helpantoj eĉ ne prenis manĝon ĉe ŝi, mem kunportante manĝaĵojn. Li Yuhua kortuŝiĝis ĝis larmoj. Kiam ni iris en ŝian hejmon, mi vidis ke jam finiĝis la konstruado kaj la kalke stukitaj muroj el brikoj aspektas fortikaj kaj plaĉaj. Antaŭ la domo la komunumanoj jam starigis framojn por lufoj kaj fazeoloj, kaj apude kreskas verda bambuaro. Post la nova domo, ili jam konstruis novan porkostalon el grizaj brikoj.


En la plagitaj regionoj ĉiutage aperis tiaj interhelpoj. Survoje al Shuangliu, najbara gubernio de Wenjiang, mi vidis grandan kolonon de helpantoj. Informiĝinte ke Huangfo-komunumo estas plagita, Gongxing-komunumo speciale sendis 52 diversajn traktorojn, ĉeval-ĉarojn kaj puŝĉarojn ŝarĝitajn per 15,000 kilogramoj da tritika pajlo, 15,000 kilogramoj da bambuoj, pli ol 200 arbotrunkoj kaj 2,750 kilogramoj da greno por helpi tiun komunumon en restarigo de produktado.

Kiam mi forlasis la plagitajn regionojn de tiu provinco, ankoraŭ rimarkeblaj estis la postsignoj de la katastrofo. Oni ankoraŭ bezonas tempon por rekonstruado. Sed la popolo hardita en la diluvo certe eliminis la makulojn de la inundo kaj kreos sian novan vivon unuanimeme kun vigla spirito.



Laboristoj de la Chongqing-a Kvinna Farmacia Fabriko forigas sedimentan ŝlimon por restarigi produktadon.

Inunditaj domoj



Post forpaso de la superakvo





Helikoptero sendita de la registaro por esplori la inundon kaj gvidi sav-laboron

Post eksterordinara inundo

En julio ĉijare pluvegis kontinue en Sichuan-provinco kaj pro tio okazis eksterordinara superakvo, kia neniam aperis dum la pasintaj cent jaroj. Ĝi inundis ĉ. cent guberniojn kaj urbojn, detruis grandan areon da kampoj, irigaciajn konstruaĵojn kaj parton da fabrikoj kaj loĝejoj, serioze damaĝis la vivon kaj posedajon de la popoloj. Post tio la loka registaro donis helpon al la plagita regiono kaj organizis la popolon por restarigi produktadon kaj rekonstrui hejmojn.





Savo de štata posedajo



Riparo de loĝdomo



Refunkcias la navigacio en Changjiang-rivero.





Por liveri elektron


La Unua Tekstila kaj Tinktura Fabriko de Sichuan restarigis produktadon.





Normale funkcias foiro post la katastrofo.

La plagitaj popolanoj enloĝiĝis en provizoraj domoj.



Riparo de digo



Esperanto estu la universala lingvo de la sento

LA 66-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Brazilio, la ĉefurbo de Brazilo, de la 25-a de julio ĝis la 1-a de aŭgusto de la kuranta jaro. Antaŭ tio plejparto de la Universalaj Kongresoj okazis en Eŭropo. Por la unua fojo ĝi prenis lokon en la lando de la tria mondo en Latin-Ameriko en la suda hemisfero. La fakto per si mem estis sufiĉe alloga. Sed ja ne estis tiel facile veturi al Brazilio pro longa kaj multekosta vojaĝo por la esperantistoj en Eŭropo kaj Azio, kiuj havas grandan intereson por la kongreso, kaj multaj el ili devis rezigni la ŝancon kun bedaŭro. Al ĝi aliĝis ĉijare nur 4 ĉinoj, inter kiuj estis mi. Tial mi estis feliĉa!

Post la kontinua flugado de unu tago kaj duono ni atingis Brazilion. Survoje de la flughaveno al la ĉina ambasadorejo (kie ni loĝis dum la kongresaj tagoj), mi estis forte altirata de la bela pejzaĝo de la tropika savano propra al Suda Ameriko. Kvankam julio en Brazilo estis vintra sezono, tamen ĉie tie troviĝis verdaj gazonoj, ambaŭflanke de la vojo iuj arboj portis ruĝajn florojn, aliaj flavajn kaj triaj purpurajn. La serena ĉielo, freŝa acro, trembrilanta akvo en la artefarita lago sub la suno kaj delikataj domoj kaj vilaoj en verdaĵoj kaj floroj sentigis al mi neesprimeblan agrablecon kaj kvietecon post la longa kaj laciga vojaĝo.

Brazilio, la nova ĉefurbo de Brazilo, kiu havas historion nur de 23 jaroj, paradas per sia "supermoderna" konstruajaro kaj unika urba aranĝo. Ĝi estas fiero de la brazilanoj kaj enkorpiĝas ilian sentimecon kaj saĝecon en la konstruado de la patrolando. Nun la brazilanoj bonvenigis en sia ĉefurbo pacamajn esperantistojn el diversaj partoj de la mondo. Malgraŭ la longa vojaĝo, pli ol 1,700 esperantistoj el 50 landoj aliĝis al la kongreso. Ja rimarkinda cifero.

La brazilaj esperantistoj fieris pro tio, ke ilia ĉefurbo fariĝis la sidejo de la 66-a Universala Kongreso de Esperanto, kaj kontribuis al ĝi per siaj multaj helpoj. Ankaŭ la brazila registaro donis grandan atenton al la kongreso, ĝi disponigis al ĝi siajn luksajn kongrescentron, nacian teatron kaj klubon por registaraj fun-

kciuloj. La inaŭguron ĉeestis kaj prezidis D-ro Aureliano Chaves, la vicprezidanto de la Federacia Respubliko de Brazilo kaj la reprezentanto de la Alta Protektanto de la kongreso, Joao Baptista de Oliveira Figueiredo, la prezidanto de la Federacia Respubliko de Brazilo. Li faris longan paroladon favoran al Esperanto kaj pro tio li estis varme akceptita de la ĉeestantoj. Li diris: "Esperanto estu ne nur la universala lingvo de inteligento, sed la universala lingvo de la sento. Se tiel estos, mi kredas, ke la laboro de Zamenhof havos dimension multe pli grandan, ĉar la homaro vere bezonas bonan kunvivadon kaj tian lingvon, des pli nuntempe." Dum la kongresaj tagoj brazilaj ĵurnaloj, radiodisaŭdiĝoj kaj televidoĵoj raportis la kongreson. Raportis ĝin ĉiutage en Esperanto ankaŭ la Nacia Ra-

Ĉinaj esperantistoj kune kun esperantistoj el Japanio, Brazilo kaj FR Germanio



diostacio de Brazilo. Multaj brazilaj organizoj donis favorojn al la kongreso, inter kiuj la Instituto Brazila Kafo regalis ĉiujn kongresanojn per kafo dum la kongresaj tagoj.

Ne nur la brazila registaro, sed ankaŭ aliaj internaciaj organizoj kaj ambasadoj al Brazilo montris grandan zorgon kaj subtenon al la kongreso. La ĝenerala direktoro de Unesko Amadou Mahtar M' Bow sendis al ĝi mesaĝon, en kiu li emfazis la grandan kontribuon de la agadoj de UEA al la disvolviĝo de la internacia komunikado, interkompreniĝo inter la popoloj kaj al firmigo de la mondopaco. Li montris, ke tiuj agadoj estas la ĉefaj celoj de Unesko. En siaj salutvortoj reprezentantoj de diversaj landoj ne simple esprimis sian bondeziron al la kongreso, sed pli multe traktis la lingvan problemon kaj konfirmis la rolon de Esperanto en la internacia komunikado. La ambasadoro de Pollando kaj komerca konsilanto de Argentino salutis la kongreson en Esperanto. Dum la kongreso pluraj ambasadorejoj en Brazilo akceptis aŭ regalis respektive esperantistojn el siaj propraj landoj, kaj tio montris, ke Esperanto estas komprenata de ĉiam pli multaj homoj kaj ĝia rolo ricevis ĉiam pli grandan atenton.

Se oni demandus min, kian apartaĵon havis tiu kongreso, tion mi ne povas respondi, ĉar mi unuafoje partoprenis en tia kongreso. La programo de la kongreso estis tre riĉa kaj multampleksa, ĉiu ĝia ero min forte altiris kaj mi volus sperti ĉiujn ĉiajn aktivadojn. Sed tio efektive ne eblis, kaj mi nur povis elekti kelkajn por mi. Iuj samideanoj opiniis, ke kompare kun

la aliaj tiu ĉi kongreso plenis de pli densa akademia atmosfero. Kredeble vere, pri tio ankaŭ mi havis profundan impreson. En la Internacia Kongresa Universitato okazigita de la kongreso prelegis 12 famaj fakuloj el 11 landoj. La enhavoj de iuj prelegoj estis tute nekompreneblaj por mi, tamen mi kun plezuro kaj respekto ilin aŭskultis, ĉar ilia flua kaj lerta lingvo jam min ravis. Mi sentis grandan ĝojon, ke Esperanto estas aplikata en pli multaj kampoj. Tio montris la progreson de nia Internacia Lingvo kaj la profundigon de la Esperanto-movado. Estas menciinde, ke la prelego farita de Chen Yuan, ĉina lingvisto kaj vicprezidanto de la Ĉina Esperanto-Ligo, sub la titolo "La Kontakto kaj Interinfluo de Homaj Lingvoj" ricevis varmegan akcepton. Li per riĉaj lingvosocioj, interesaj ekzemploj kaj spritaj lingvaĵoj kaptis la koron de la aŭskultantoj kaj en la kunveno eksplodis de tempo al tempo ridado kaj aplaŭdado.

La ĉijara kongrestemo estis "Kulturoj kaj Lingvoj: Pontoj kaj Baroj". Pri ĝi penetrive parolis la prezidanto de la Akademio de Esperanto William Auld, Sylla Chaves, Humphrey Tonkin kaj Baldur Ragnarsson. Estis neatendite, ke mia parolaĵo "La Ĉina Komuna Lingvo kaj Esperanto" estis laŭdita de la aŭskultantoj, kaj tio ja estis granda kuraĝigo por mi.

Dum la kongreso mi havis honoron ricevi radiofonian intervjuon de LKK kaj mi dankis ilin ke ili donis al mi, ordinara ĉina esperantistino, la ŝancon saluti en nia kara lingvo la samideanojn de la kvin kontinentoj de la mondo pere de la Nacia

Radiostacio de Brazilo. Kiam mi estis petita respondi kian impreson mi havas pri la kongreso, mi diris, ke ĝi havigis al mi la plej bonan ŝancon por konatiĝi kaj amikiĝi kun diverslandaj esperantistoj. Ĉu tio ne estas fakto? En la mallonga tempo de unu semajno ni havis ŝancojn libere kaj amike interparoli kun esperantistoj el 50 landoj kun malsamaj aĝoj, seksoj, haŭtokoloroj, religioj kaj profesioj, kion povas atingi neniu alia internacia organizo aŭ internacia konferenco. En la kongresejo mi estis ofte ĉirkaŭata de diverslandaj geamikoj. Gemaljunuloj montris al mi apartan zorgon kaj gejunuloj prenis min kiel sian sinceran amikino, ili diskutis kun mi pri diversaj problemoj en la kadro de politika sistemo ĝis familia vivo. Estante kun ili mi sentis min pli juna kaj pli serena. Mi sate ĝuis la varmecon en tiu harmonia internacia familio.

Kortuŝa kaj neforgesebla estis la amikeco de la brazila esperantisteto Afonso Claudio Mattos al mi. Li havas 13 jarojn kaj komencis lerni Esperanton antaŭ du jaroj. Li jam povis flue paroli kun mi en Esperanto pri siaj familioj, lernado de Esperanto, ŝatokupo kaj intereso pri Ĉinio kaj prezentis min al sia onklino. Preskaŭ ĉiutage li iris al mi, iam servis kiel mia interpretisto, kiam mi parolis kun neesperantistaj brazilanoj, kaj iam gvidis min al loko, kien mi volis iri. Ĉiufoje, kiam li min vidis, li demandis, kiel mi fartas kaj ĉu mi bezonas lian helpon. Iutage li eĉ donacis al mi blankan rozon. Tuj post la fermiĝo de la kongreso li venis al mi por adiaŭi kaj deziri al mi agrablan vojaĝon. Jam velkis

la rozo de Afonso, tamen restos por ĉiam en mia memoro liaj belaj brilantaj okuloj kaj lia infana frateco kaj sincereco.

Min ĝojigis ankaŭ tio, ke inter la kongresanoj estis multaj legantoj de nia revuo "El Popola Ĉinio" kaj aŭskultantoj de Radio Pekino. Laŭ la peto de raportisto de Radio Pekino Nan Youli, du famaj argentinaj kantistinoj kun plezuro kantis ĉinan kanton "Honghu-akva Mond' Ondon Pelas Ond'", kiun ili ellernis el EPC, kaj lasis Nan sonbendigi iliajn voĉojn. Dum la kongreso ĉefredaktoro de EPC Zhang Qicheng kunvokis kunsidon por legantoj kaj perantoj de la revuo en Latin-Ameriko kaj dekelkaj amikoj ĉeestis ĝin laŭinvite. Ili rigardis la plibonigon de la revuo kiel sian propran aferon kaj sincere kaj serioze prezentis al ni multajn bonajn opiniojn kaj proponojn.


Partoprenante la kongreson mi forte sentis, ke Esperanto ne nur havas grandan vivipovon kiel interkomunikilo, sed portas ankaŭ novan noblan senton, kaj ĝuste tiu sento kunligas la esperantistojn de la tuta mondo. Nun mi pli profunde komprenas la sencon de la kanto "La Espero":

*En la mondon venis nova
sento,
tra la mondo iras forta
voko;
per flugiloj de facila vento
nun de loko flugu ĝi al
loko.*

.....



Argentinaj esperantistinoj kantas ĉinan kanton en Esperanto.



La Ĉina Esperanto-Delegacio interparolas kun estraranoj de UEA.





La ĉina komuna lingvo kaj Esperanto

de TAN XIUZHU

Tio ĉi estis parolado de Tan Xiuzhu en unu el la kunsidoj pri la kongresa temo "Kulturoj kaj Lingvoj: Pontoj kaj Baroj" dum la 66-a Universala Kongreso de Esperanto.

— La Red.



Mi venis el la Ĉina Popola Respubliko, kaj estas unufoje por mi partopreni en la Universala Kongreso de Esperanto. Kvankam mi parolas Esperanton nebone, tamen mi volas profiti la ŝancon por praktiki la lingvon kaj ankaŭ provi mian kuraĝon. Hodiaŭ mi iom parolu pri la lingva baro kaŭzita de la dialektoj de la hana lingvo en Ĉinio kaj ĝia solvo.

Kiel vi scias, Ĉinio estas lando kun multaj naciecoj, kaj la plej granda el ili estas la hana nacieco, kies lingvo estas parolata de ĉ. 900 milionoj da popolanoj. Ĉar Ĉinio estas tre vasta kaj la hanoj loĝas dise en ĉiuj ĝiaj provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj, tial en la hana lingvo neeviteble estiĝis multege da dialektoj, kies komplikeco estas malfacile imagebla. Ĝi kaŭzis lingvan baron al loĝantoj de malsamaj provincoj kaj malsamaj gubernioj, kaj pro tio eĉ loĝantoj ambaŭflanke de la sama rivero aŭ sama monto ne komprenas unu alian. Kiel ekzemplon mi prenu la dialekton de la provinco Guangdong, la hejmloko de nia delegaciestro s-ro Chen Yuan. La tiea dialekto estas nekomprenebla kvazaŭ fremda lingvo por preskaŭ ĉiuj nordaj loĝantoj de Ĉinio. Krome Ĉinio estis sub la regado de feŭdismo dum pli ol du mil jaroj. Ĝia natura ekonomio kun aŭtarcio kiel la ĉefa karakterizaĵo tre favoris la kreskon de dialektoj

kaj estiĝis lokan ekskluzivismon. Nun kvankam multe progresis la socio, tamen ankoraŭ ekzistas restaĵo de la malnova socio. En Guangdong, se vi ne parolas lokan dialekton, vi estas nebonvena kaj eĉ traktata malvarme. Alian ekzemplon: La fama ĉina esperantisto s-ro Tikos en nia redakcio devenis de Ningbo, urbo en suda Ĉinio. Ankaŭ lia parolo en dialekto multe min kapdolorigis. Kiam li diris ion al mi, li ofte devis foje refoje klarigi ĝin por ke mi bone komprenu. Sed lia klopodo ofte malsukcesis, kaj en tia okazo ofte estis Esperanto, kiu savis nin el la embaraso. Mi diris al li: "Kara Barbulo, mi preferas ke vi parolu en Esperanto ol en via dialekto."

La multeco de la dialektoj de la hana lingvo kaj baro kaŭzita de ili en la kontaktoj de diversaj lokoj estas ofte prezentataj en nia popola arto humura dialogo, kaj ankaŭ tio montris la seriozecon de la baro de dialektoj.

Por forigi la lingvan baron kaŭzitan de la dialektoj, nia lando komencis disvastigi la ĉinan komunan lingvon en 1956. Kio estas la ĉina komuna lingvo? Ĝi estas la komuna lingvo de la hana nacieco kaj ankaŭ oficiala lingvo de la Ĉina Popola Respubliko. Ĝi prenas la pekinan sonsistemon kiel la normon de prononcado, la dialekton de norda Ĉinio kiel bazan dialekton kaj

la gramatikon de la modernaj literaturaj verkoj en la ĉina parola lingvo kiel la norman.

La disvastigo de la ĉina komuna lingvo ne celas nuligi la dialektojn de la hana lingvo. Ankaŭ la dialektoj estas utilaj komunikiloj, kiuj servas al la bezono de iliaj uzantoj en diversaj regionoj de Ĉinio. Ni esperas nur, ke oni posedos la ĉinan komunan lingvon krom sia propra dialekto por faciligi la interkomunikadon inter la loĝantoj de malsamaj lokoj.

La disvastigo de la ĉina komuna lingvo havas signifon en multaj flankoj. Ĝi utilas al ekonomiaj kunlaboroj kaj interŝanĝo de spertoj de diversaj lokoj kaj al disvolvo de industria kaj agrikultura produktado, scienco kaj kulturo; ĝi helpas en forigo de la lingva kaj senta bariero kaŭzita de la dialektoj kaj en plifortigo de solidareco de diverslokaj popolanoj; kaj ĝi ankaŭ utilas por plifortigo de la amikaj kontaktoj inter la popoloj de la tuta mondo. Kaj krome, ĝi estas nepre necesa por latinigi la ĉinajn ideografiajn.

La ĉina ideografio havas historion de pli ol 3,000 jaroj. Ĝi ludis gravan rolon en la disvolviĝo de politiko, ekonomio kaj kulturo de Ĉinio. Tamen kun progreso de la modernaj sciencoj kaj teknikoj, la ĉinaj ideografiaĵoj, kiuj estas malfa-

cile lerneblaj pro siaj multaj strekoj, montriĝas pli kaj pli malkonformaj al la bezono de la epoko. Ili certgrade malhelpas la disvastigon de legoscio kaj la mekanikigon de presado, telegrafo ktp. Tial multaj ĉinaj kleruloj, precipe ĉinaj esperantistoj, proponis antaŭlonge la reformon de la skribado de la ĉina lingvo, inkluzive de la disvastigo de la ĉina komuna lingvo kaj latinigo de la ĉinaj ideografiaĵoj. Iuj eĉ proponis anstataŭigi la hanan lingvon per Esperanto. Frue en la tridekaj jaroj ĉinaj esperantistoj elmetis sloganon: "Ni uzu enlande la latinigitan novan skribadon kaj eksterlande Esperanton!" Ili opiniis, ke la disvastigo de la ĉina komuna lingvo kaj la latinigo de ĝia skribado multe utilas por forigo de analfabeteco, levo de la kultura nivelo de la tuta ĉina nacio kaj interfluo de ekonomio, kulturo, scienco kaj tekniko. Ĝi ankaŭ utilas al la disvastigo de Esperanto en Ĉinio dank' al alkitimiĝo de la ĉina popolo al la latinigita skriba lingvo.

En nia lando oni disvastigas la ĉinan komunan lingvon unue en

lernejoj, precipe en elementaj kaj mezgradaj lernejoj, ĉar la infanoj lernas la lingvon multe pli facile ol la plenkreskuloj. Ĝi devas esti aplikata ankaŭ en radiodisaŭdigo, televido, filmoj kaj arta prezentado, escepte de lokaj teatraĵoj. Ja rimarkindan sukceson ni jam atingis tiuflanke en la pasintaj pli ol 20 jaroj. Nun ĉiuj, kiuj ricevis elementan aŭ mezgradan edukon, povas kompreni aŭ paroli la ĉinan komunan lingvon. Ankaŭ la registaraj funkciuloj, ĝenerale, parolas per ĝi. Ekzemple, ni kvar membroj de la Ĉina Esperanto-Delegacio venis el tri dialektaj regionoj kies parolaj lingvoj havas grandan diferencon inter si. Tamen dank' al tio, ke ni ĉiuj parolas per la ĉina komuna lingvo, ni bone komprenas unu alian. Kompreneble, ni parolas ĝin ne tiom ĝuste kaj kun iom da dialekta tono, tamen tio ne malhelpas nian reciprokajn komprenon.

Ĉar la disvastigo de la ĉina komuna lingvo havas iom da simileco en sia celo kiel tiu de Esperanto, t.e. ili ambaŭ celas forigi lingvan baron, la antaŭa nur en landa skalo, kaj la

lasta en internacia skalo — la mondo, tial ni ĉinoj nomas Esperanton internacia komuna lingvo. En la nuna tempo Esperanto servas kiel pontlingvo en la internacia komunikado, tamen mi kredas, ke kun la disvolviĝo de sciencoj kaj teknikoj, plifaciliĝo de internaciaj trafiko kaj kulturaj interŝanĝoj kaj plioftiĝo de internacia kunlaboro en multaj kampoj, la naciaj lingvoj fine kunfandiĝos en malproksima estonteco en la Internacian Lingvon kaj ankaŭ la Internacia Lingvo sin riĉigos kaj perfektigos per ĉerpado de la utilaj elementoj de la naciaj lingvoj.

Hodiaŭ ni esperantistoj venintaj el diversaj partoj de la mondo kolektiĝas ĉi tie kaj per la sama lingvo diskutas diversajn problemojn kaj reciprokas amikecon, la fakto mem jam multe inspiris min kaj montris la vivipovon de nia lingvo. Tio konvinke prezentas al ni la vojon solvi la lingvan baron internacie kaj vidiĝas al ni la belan perspektivon de harmonia kunvivado de la tuta homaro.



BAKIN ELEKTITA KIEL MEMBRO DE LA HONORA PATRONA KOMITATO DE UEA

Bakin, la aganta prezidanto de la Ĉina Verkista Asocio kaj vicprezidanto de ĈEL, estis elektita kiel membro de la Honora Patrona Komitato de UEA en la 66-a Universala Kongreso de Esperanto. La komitato konsistis el 9 membroj, kiuj plejparte estas eminentaj esperantistoj en sia lando.

La 11-an de septembro Bakin skribis al la ĝenerala sekretario de UEA, d-rino Flora Szabo-Felso, por esprimi sian koran dankon al ŝi kaj aliaj estraranoj de UEA pro ilia propono por kandidatiĝi lin. En la letero Bakin diris: "Tio estas

granda honoro ne nur al mi mem sed ankaŭ al la ĉina esperantistaro kaj la movado en nia lando." Li esprimis ke malgraŭ ke li estas multe okupata pro sia literatura agado, li volonte klopodos iel kontribui al la komuna nobla afero.

LA 66-A UK ALTE TAKSATA EN ĈINIO

Estis alte taksata de ĉinaj ĵurnalistoj la 66-a Universala Kongreso de Esperanto en Brazilo. La ĉinaj ĵurnaloj Renmin Ribao kaj Guangming Ribao kun plej granda legantaro ĝustatempe publikigis la novaĵojn senditajn de ĵurnalisto de Xinhua-a Novajagentejo en Brazilo pri ĝiaj inaŭguro kaj fermo kaj donis koncizan informon pri la kongresaj temoj kaj la historio de Esperanto. La Xinhua-a Novajagentejo disdonis koncernajn novaĵojn ankaŭ al la lokaj gazetoj de la lando.

La 22-an de aŭgusto ĈEL kaj la Pekina Esperanto-Asocio okazigis kunvenon, en kiu Chen Yuan kaj Zhang Qicheng (Ĉ. Ĉen) el la ĉina delegacio al la 66-a UK raportis pri la kongreso kaj sia impresoj pri ĝi. En la kunveno oni aŭskultis ankaŭ parolojn, kantojn k.a. surbendigitaĵojn dum la kongreso.

LA SIPING-A ESPERANTA ASOCIO FONDITA

La nomita asocio fondiĝis la 1-an de julio. La urbaj respondeculoj pri propagando kaj sciencoteknikaj fakoj, diversrondaj reprezentantoj kaj esperantistoj, sume 250 homoj, ĉeestis ĝian inaŭguron. Ĝi elektis vicprofesoron Liu Wenhan de la Siping-a Normala Instituto kiel la honoran prezidanton de la Siping-a Esperanta Asocio kaj Chang Qing kiel ĝian prezidanton. La urba radiostacio elsendis la no-

vajon pri tio kaj konigis Esperanton al la aŭskultantoj.

ESP-AKTIVADOJ EN ALIAJ ĈINAJ URBOJ

La 15-an de julio la Bengbu-a Esperanta Asocio kunvokis kunvenon por celebri la 94-an datrevenon de la apero de Esperanto. Ĝin ĉeestis gvidantoj de la urbaj partia komitato kaj scienca asocio kaj la lokaj esperantistoj. La Esp-kursanoj prezentis programerojn en la kunveno.

En Wuxi, la Esp-kurso de la Kultura Domo okazigis en la movoplena distrikto la ekspozicion "Esperanto, la Internacia Helpa Lingvo", kiu altiris al si multajn rigardantojn.

La Chongqing-a Esperanta Asocio okazigis la Duan Esperantan Someran Semajnon en Nanwenquan, kiu altiris al si multajn novajn kaj malnovajn esperantistojn.

En la lasta tempo nombro da novaj Esperantaj kursoj ekfunkciis en iuj grandaj kaj mezgrandaj urboj. La Esperanta Instituto de Jilin-provinco okazigis la duan Esp-kurson, kiun vizitas 240 personoj por du jaroj. La Nanning-a Esperanta Instituto okazigis la 4-an Esp-kurson kun pli ol 130 lernantoj. Krome, en Bengbu oni funkciigis mezgradan Esp-kurson, en Xi'an someran Esp-kurson kaj en Liaoning parolan kurson.

FAKA KUNSIDO DE LA HUBEI-A ESPERANTA ASOCIO

La nomita kunsido okazis en Huangshi, la dua granda urbo de

Hubei-provinco, de la 25-a ĝis la 26-a de julio. Pli ol 200 esperantistoj el 26 provincoj, municipoj kaj aŭtonomaj regionoj de Ĉinio ĉeestis la kunsidon, en kiu faris raporton Wang Yapu, vicestro de la Orientĉinia Normala Universitato, kaj You Kuanren, vicesploristo de la Harbina Politeknika Universitato. En la kunsido la esperantistoj sin okupantaj pri instrua kaj scienc-teknika laboro kaj la kursanoj de la Esperanto-Koresponda Lernejo interŝanĝis siajn opiniojn pri la aktuala Esp-movado. Post la kunsido ili vojaĝis al la pitoreska Lushan-monto en Jiangxi-provinco.

FREMLANDAJ ESPERANTISTOJ-TURISTOJ EN ĈINIO

Julio kaj aŭgusto estas plej favora sezono por turismo. En tiuj du monatoj ĉijare ankaŭ multe da fremdlandaj esperantistoj vojaĝis en Ĉinio, inter kiuj estis respondeculo de la junula fako de SAT Jean Pierre Levy, respondeculo de la Korea E-asocio en Japanio Kwak Dae Shik, lingvisto kaj honora profesoro de Nara-Universitato Kawasaki Naokazu kaj s-roj Nakamura Ĵicuro kaj Hirano Noboru kaj s-rino Paulette Pêche de Francio. Plejparto de ili intervidiĝis kun ĉinaj esperantistoj.

TUTLANDA DELEGITARA KUNSIDO DE JAPANA ESPERANTO-INSTITUTO

Por diskuti kaj diskonigi la agadplanojn de JEI okazas unu fojon ĉiujare tutlanda delegitara kunsido en Tokio. Ĉijare, la 21-an

de junio kolektiĝis el la tuta lando 38 personoj, kiuj konsistis el reprezentantoj de 10 el JEI-filioj, 6 el gravaj, influhavaj organizadoj distriktoj, Rondo Harmonia kaj Esp. Propaganda Asocio de Oomoto kaj 22 el estraranoj kaj konsilianoj de JEI.

Aparte de kutimaj pritraktoj de temoj prifinancaj kaj agadplanaj de JEI por la jaroj 1980-81, ĉi-foje oni fokusis la diskuttemon al "informado".

Responde al enkonduka parolado pri la informaj aktivecoj fare de s-ro Umeda Joŝimi, estro de Informa Fako de JEI, diversaj spertoj, ideoj, proponoj kaj projektoj estis prezentitaj de la ĉeestantoj. Estas aparte menciinde, ke tra Japanio aperas ĉiumonate dekoj da artikoloj, anoncoj, informoj kaj pritraktoj pri-Esp-aj en ĵurnaloj, gazetoj kaj aliaj publikigadoj, dank' al persista laborado de multaj esp-istoj tra Japanio. Plimultiĝis ankaŭ telekomunikada informado.

EPĈ UZITA EN ESP. KLASOJ UNIVERSITATAJ

El Popola Ĉinio estis uzita en Esp. klasoj ĉe la Universitato de Brigham Young en Provo, Utah, Usono. En kvar porpoentaj klasoj tie estis 130 gestudentoj, kiuj lernis la fundamenton de Esp. La kursoj daŭris kvar semajnojn dum la studjaro 1980-81, kaj ĉiuj kursanoj ekkorespondis. S-ano Paul Reinhold Kern, prezidanto de Por-Esperanta Mormonaro, estis la kursgvidanto.

P-EM estas mondskala organizo, kiu servas la mondan esperantistaron. Ĝi havas korespondservon kaj subtenas senpagan korespondkursaron. Haveblaj ĉe ĝi estas pluraj senpagaj broŝuretoj kaj faldfolioj en Esp. Ankaŭ aĉeteblaj pere de P-EM estas diversaj priprelegaj kasetoj en kaj pri Esp. Skribu al P-EM, 7222 University Station, Provo, Utah 84602, Usono.



"Renkontiĝo en Esperantujo" en la kadro de la faka kunsido de la Hubei-a Esperanta Asocio

Scienca eldona centro de UEA

— *Kion ĝi faras kaj planas?*

BUDAPEŝTA Esperanto-Centro de UEA pri Eldona kaj Sciencteknika Agadoj (adreso: pf. 193, H-1368 Budapest, Hungario), kiu oficiale ekfunkciis komence de aprilo ĉi-jare, jam partoprenas diversajn fakajn laborojn kaj planas multajn aliajn. Ni ĉi tie provas resumi tiurilatan raporton, kiun fine de majo faris la gvidanto de la Centro prof. d-ro Ottó Haszpra.

Du fakaj kunvenoj, ĉi-jare en Hungario, nuntempe okupas la Centron: Studenta Aŭtuna Forumo en Szeged, kiu celas konatigi al studentoj kaj aliaj junaj fakuloj la atingojn kaj perspektivojn de la scienca E-agado kaj partoprenigi ilin en ĝi. La Centro kompilas la programon de tiu aranĝo kaj faras aliajn organizajn laborojn. Internacia Ekonomikista Simpozio estas planita por la periodo inter la 27-a de decembro kaj la 2-a de januaro 1982, en Budapeŝto. Oni planas okazigi ĉi tiun fakan kunvenon en kunlaboro kun la Budapeŝta Ekonomika Universitato kaj Hungara Ekonomika Societo.

La Centro okupiĝas ankaŭ pri la kunordigado de kelkaj terminologiaj laboroj, kiel ekzemple: orient-eŭropa varianto de la 9-lingva INTERNACIA KOMERCA-EKONOMIKA VORTARO; kolektiva verko 4-lingva RADIOTEKNIKA TERMINARO, kun 847 terminoj en Esperanto, angla, hungara kaj rusa; FAKVORTARO DE LA PUBLIKA INSTRUADO, 3-lingva, kun pli ol mil terminoj; INDUSTRIA KOOPERATIVA FAKVORTARO, 6-lingva, kun ĉ. 800 terminoj. Ĉiuj ĉi verkoj estas en diversaj preparstadioj, kaj la laboro okazas kunlabore kun la Terminologia Centro de Internacia Scienca Asocio Esperantista pere de ties gvidanto akademiانو Rüdiger Eichholz en Kanado.

La Centro faris detalajn eldonproponojn pri jenaj fakaj verkoj: ĈU VI KONAS LA TERON? (ĈAPITROJ EL LA GEOLOGIAJ SCIENCOJ de d-ro Endre Dudich (la manuskripto estas preskaŭ prespreta); NAVIGACIA REGULARO, oficiala kolekto de navigaciaj reguloj

(la traduko atendas revizion); NATURSCIENCA ENCIKLOPEDIETO, de kvardeko da germanaj sciencistoj (okazas detalaj sondoj pri la granda traduklaboro, kiu verŝajne daŭros kelkajn jarojn); KOMPENDIO DE LA ORGANIKA KEMIO de d-rino Ilona Gál (la manuskripto preta kaj kontrolita). Krome, la Centro planas transpreni la eldonadon de SCIENCAJ KOMUNIKAĴOJ, faka kalendaro, kiu ĝis nun aperadis supleme al la periodaĵo BUDAPEŝTA INFORMILO.

Ĉiujn ĉi proponojn unue traktos la Estraro de UEA, ĉar temas ankaŭ pri konsiderinda investo de la asocia kapitalo. Tamen, jam la listigo de la projektoj klare montras, ke starigo de la Scienca Eldona Centro de UEA — tio estas ĝia malpli longa nomo — alportos gravan vigligon de la faka Esperanto-laboro kaj bezonatan riĉigon de la scienca literaturo en la Internacia Lingvo. Komprenoble, la menciitaj verkoj ne estas produkto de la dumonata laboro de la Centro, sed ĝia ekzisto ja ebligis al ni konatigi kun ekzistantaj projektoj kaj kunordigite labori por ilia realigo. (Reprezenta el ESPERANTO)

BLINDULA ESP. RONDETO EN POZNAN

En Poznan, Pollando, renkontiĝis blindaj esperantistoj je la 29-a de junio kaj fondis la unuan Esp. rondeton en tiu urbo. La ĉefa tasko estas disvastigo de Esperanto, krom kultura kaj socia agado. Inter 14 ĉeestantoj-fondintoj oni formis 3-personan komisionon, kies estro fariĝis s-ano Borys Wierzejewski. Tiu ĉi rondeto funkcias depende de

Pola Esperanto-Asocio kaj Pola Blindul-Asocio.

1.000 BF POR EKSTERLANDAJ GASTOJ

Ekde la 10-a de majo la Esperanto Klubo en Antwerpen posedas propran kunvenejon. Ĉiun duan vendredon de la monato (je la 20-a horo) la programo estos rezervita al eksterlanda vizitanto. La klubo proponas al kandidatoj:

— 1.000 BF

— vespermanĝon

— tranoktadon ĉe esperantisto

Tiuj, kiuj ŝatas ĝui tiujn kompensojn, avertu antaŭ 1 monato. Ili skribu al "La Verda Stelo", Frankrijklei 140, B 2000 Antwerpen, Belgio, aŭ telefonu: antaŭ 1/11/81 Nro 32 31 16 05 05, post 1/11/81 Nro 32 31 34 34 00.



Celebrante la 100-jaran jubileon de la
naskiĝo de la fama ĉina literaturisto
LUSIN (1881-1936)

“El Popola Ĉinio” ĵus eldonis en Esperanto

**MATENAJ FLOROJ KOLEKTITAJ
EN VESPERO**

*Kolekto de dek eseoj
(10-Es-1387P)*

120 × 186mm. 164 paĝoj. Broŝurita. Ilustrita.

Prezo: £0.45 US\$0.90

Mendu ĉe: *Libroservo de UEA*

Peranto de EPĈ

aŭ: *Esperanta Sekcio de GUOJI SHUDIAN
P.O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio*

**Bela silka portreto de
D-ro ZAMENHOF**

Tre delikate teksita per blanka kaj nigra
silkaĵo. Kun aŭtografo. Borderita.
Facile enkadriĝebla aŭ alimaniere pendigebla.

Formato: 28 × 42cm.

Eldonis: Ĉina Esperanto-Ligo

Prezo: 9,00 gld.

(Triona rabato por la aĉeto de tri ekzempleroj)

Mendu ĉe: *Libroservo de UEA*

aŭ ĉe: *Ĉina Esperanto-Ligo*

P.O. Kesto 77, Beijing, Ĉinio



Plena analiza gramatiko de Esperanto

de K. KALOCSAY kaj G. WARINGHIEN

La nova kvara eldono estas ampleksigita kaj detale reviziita. La 600-paĝa bele bindita libro enhavas 70-paĝan indekson kaj enhavtabelon, por faciligi la retrovon de kiu ajn temo. La libro celas meti en la manojn de la Esperanto-parolantoj oportunan rimedon malkovri kia estas la tradicia, klasika uzado pri ĉiuj punktoj de la lingvo.

599p. 22cm. Bindita. ISBN 92 9017 022 0

Prezo: 48,00 (por Nederlando 49,92) gld.,

plus sendokostoj. Triona rabato ekde

3 ekzemplera mendo.

Mendu ĉe: *Libroservo de UEA*

Tanzhe-templo

Fotoj de QU YINSHOU

Tanzhe-templo en verdajo






Statuoj de budhaj militistoj



Miljara ginko en la korto de la templo





Antău la nove
riparita ĉefa halo

Portalo antău
la templo



FOTOJ PRI NATU-
RAJ BELAĴOJ FA-
RITAJ DE E-ISTOJ



Disvolviĝantaj ĉinaj ĉerizfloroj en Norvegio

de ELESE KOLLER (Norvegio)

Kampanoj rikoltantaj rabarbon

de RUDOLF MESSERER (FR Germanio)



Tanzhe-templo

de ZHONG BIAN

JAM de centoj da jaroj cirkulis inter la loĝantoj de Beijing la diro, ke la templo Tanzhe estas pli aĝa el la urbo de Beijing. Tio montris, ke la templo havas tre longan historion.

La templo estis konstruita en la fino de la 3-a jarcento, kaj portis la nomon Jiafu. Poste ĝi estis riparita en diversaj dinastioj kaj estis plurfoje alinomita. En Tang-dinastio (618-907 p.K.) la templo fariĝis granda predikejo de budhisma sutro. En la periodo de la Kvin Dinastioj (907-960 p.K.), ĝi jam fariĝis unu el la famaj temploj en norda Ĉinio, kaj kun siaj pli ol 1,000 disĉiploj unu abato venis al la templo por prediki sutron. En la regperiodo (1662-1723 p.K.) de la imperiestro Kangxi de Qing-dinastio, la templo estis refoje plivastigita grandskale, kaj la imperiestro persone skribis por la templo la nomon, tiu nomtabulo kun ideografiaĵoj "Xiuyun-templo" nun ankoraŭ pendas super la pordo de la templo. Sed la plej populara nomo de la templo estas Tanzhe, kiun donis la turistoj. Ĉar sur la monto post la templo estas lageto ("lageto" en la ĉina lingvo prononciĝas "tan") kaj ĉe la montpiedo kreskas valora arbo kudranio (*Cudrania tricuspidata*, ĉinoj nomas kudranion "zhe"). Tial la templo ricevis la neoficialan nomon Tanzhe.


La templo situas en la montaro en la okcidenta antaŭurbo de Beijing, kaj por tien atingi, oni devas veturi ĉ. unu horon. La templo rigardas suden kaj okupas areon de pli ol 30,000 kvadrataj metroj, el kiuj 12,000 estas okupitaj de konstruaĵoj. La loko estas ĉirkaŭata de 9 montopintoj kiel jadaj ekranoj

kaj smeralda ŝirmilo. Tie estas ne tre malvarme en vintro nek tre varme en somero. La konstruaĵoj de la templo dividiĝas en tri partojn: la centra parto konsistas el la antaŭa, meza kaj posta budhaj haloj; la orienta estas pasinta provizora palaco; kaj la okcidenta estas predikejo de budhisma sutro. Ekster la templo estas du kortoj, en kiuj staras dekoj da brikaj pagodoj. Ekde la dinastio Jin (1115-1234), la eminentaj bonzoj de la templo estis entombigitaj en la pagodoj post ilia morto.

La halo Mahavira en la meza parto estas la centro de la konstruaĵoj de la templo. La halo imponas staras sur la vasta bazamento ĉirkaŭata per balustrado el blanka marmoro. Meze de la halo estas la

statuo de Ŝakjamunio, kiu estis princo de Ŝakja-gento de Hindio antaŭ 2,500 jaroj. En la aĝo de 29 jaroj li forlasis sian hejmon kaj komencis studi religiajn doktrinojn, poste vagadis en la mezo de Hindio kaj tie faris predikadon. Li forpasis en la aĝo de 80 jaroj kaj estis nomita "Gotamo". Ambaŭ ekstremoj de la firsto de la tegmento de la halo estas ornamitaj per po unu brilkolora glazurita kapo de mitologia birdo. Ĉina legendo diras, ke ornaminte la tegmenton de konstruaĵo per tiu figuro, oni povas protekti la konstruaĵon de incendio. Sendube tio nur estas superstiĉaĵo, sed en miĉo da jaroj la dekoraciaĵo de domoj herediĝis de generacio al generacio, kaj fariĝis la konsistiga parto de la antikva ĉina arkitekturo.

Tanzhe-templo



Trairinte la halon oni atingas vastan korton, en kiu kreskas altaj arboj kaj floroj, ili multe beligas la templon. Oriente en la korto pompe kreskas ginko postrestigita de Liao-dinastio antaŭ ĉ. mil jaroj. Ĝi altas 30 metrojn kaj ĝia malsupra trunko estas ĉirkaŭebla de 6

homoj kune etendantaj ambaŭ brakojn. Oni diris, ke antaŭ ĉ. 200 jaroj imperiestro Qianlong ekskursis tie kaj, vidinte la arbon, li titolis ĝin "imperiestra arbo". Poste, en la okcidenta parto de la korto oni plantis simetrie alian ginkon, kiun oni nomis "princa arbo".

La konstruaĵoj de la orienta parto estas stile malsamaj al la templa arkitekturo. La malaltaj kabanjoj, la brilverdaj bambuaroj, la lirlanta roĵo, la laŭboj . . . la vidaĵo impresas ekskursantojn per gracieco kaj kvieteco. Norde, apud bambuaro, el muro elstaras glazurita drakokapo, el kies buŝo fontas klara akvo. La akvo fluas en kvadratan kioskon. Sur la blankmarmora bazo de la kiosko troviĝas zigzaga kanaletto larĝa je ĉ. 10 centimetroj. La fontoakvo trafluas la kanaleton eksteren. Antaŭe la kiosko estis distrejo por imperiestraj familianoj kaj korteganoj kaj ankaŭ loko de la abato por regali gastojn. Ili metis vintasojn en la fluon, kaj tiuj ĉi rondiris laŭ la fluo, kaj tiam ĉiu ĉeestanto povis depreni tason de la akvo por drinki. Tial la kiosko ricevis la nomon "Kiosko de Flosanta Taso".


La konstruaĵoj de la okcidenta parto estas solenaj, sidantaj unu pli alte ol alia sur la montodeklivo. La plej altan lokon okupas la halo de Avalokitesvaro. Ĉe la anguloj de la tegmento pendas kupraj tintiloj, kiuj agrable sonoras en zefiro. En la halo estas statuo de Avalokitesvaro. En budhismo Avalokitesvaro estas la supera bodisatvo en la paradizo, kaj povas savi la karnularon. Legendoj diras, ke li povas aliformi sin en 32 figurojn, kaj ofte en virinan figuron, kaj tial en multaj temploj li estas modlita kiel figuro de bela virino. Oni diris, ke en la 13-a jarcento la princino Miaohu, filino de imperiestro Kublajo de Yuan-dinastio, bonziniĝis en la templo. Ŝi estis tre pia kaj severe observis la regulojn de budhismo. Pro longa genuado en preĝado ŝi eĉ faris du profundajn kavojn sur unu kvadrata briko, sur kiu ŝi preĝadis. Bedaŭrinde la briko jam perdiĝis.

En la lastaj jaroj la ŝtato asignis grandan sumon da mono por ripari la templon kun pli ol 400 ĉambroj. La templo nun fariĝis vizitinda pitoreskejo.



Pagodaro

Lageto malantaŭ Tanzhe-templo



Incidento de kampara familio

— Pri la rakonta filmo “Familio Plena de Ĝojo”

LA nomita filmo farita de la Shanghai-a Studio estis projekciata ekde printempo ĉi-jare en Ĉinio kaj estis bone akceptita. En nur duonmonato ĝi projekciigis je pli ol 3,100 fojoj en Beijing kaj estis rigardata de pli ol 2,700,000 homoj.

La filmo priskribas la malpacon de iu kamparana familio en norda Ĉinio. Ĝi komenciĝis per la geedziĝa festo de brigadestro Renwu kaj Shuilian. Ĉu en la vilaĝo ĉu en la familio regis plena ĝojo. Baldaŭ en tiu 9-membra familio aperis kontraŭdiroj unu post alia. Qiangying, la bofratino de Renwu, estas virino egoisma kaj miopa. Ŝi volis komploti kun la novelino Shuilian por akiri pantalon-ŝtofon de la bopatrino, sed Shuilian ne kunagis kun ŝi kaj anstataŭe admonis ŝin ne kvereli kun la bopatrino pro tiu bagatelo kaj teni harmonion de la familio. Qiangying fojefoje kreis konfliktojn senkaŭze, sed ŝin admonis ĉiamaniere la tuta familio. Gajninte nenian profiton en tiu familio, ŝi insistis dividi la familion en kverelado kun la fratino de sia edzo. Ŝi ne volis vivteni la malsanan bopatrino kaj vole-nevole konsentis vivteni la boavon. Iutage, ŝi kaŝe preparis frandajon por siaj edzo kaj infanoj, sed lasis al la boavo

manĝi vaporumitan maizbulon kaj peklitan legomon. Post kiam tio estis malkaŝita, la maljunulo foriris de ŝia familio en pluvado. Renwen, la edzo de Qiangying, estas honesta kaj iom timema al la edzino kaj laboras en la veterinara stacio de la komunumo. Tuj post la foriro de la avo li neniel povis toleri la faron de sia edzino kaj donis al ŝi vangfrapon, kaj transloĝiĝis en la stacion. Sekve ankaŭ la edzino venis al la stacio kun la du infanoj. La geedzoj kverelis kaj luktadis ĝis preskaŭ nuligo de la geedzeco. La nov-

edzino Shuilian estas honesta, grandanima kaj sindonema. Ŝi ne timas mokadon de sia bofratino. Unue, ŝi iniciate vivtenis la malsanan bopatrino kaj cedis al Qiangying sian ŝrankon aĉetitan por la geedziĝo, kaj poste ŝi persone venis al la familio de la gepatroj de Qiangying por admone venigi la lastan al la hejmo. Riproĉate de la publika opinio, precipe dank' al la helpo de Shuilian, Qiangying konfesis sian eraron kaj ŝanĝis sian sintenon. Fine la tuta familio ĝoje vivas en plena harmonio.

Traktoristino Renfang kaj kontisto Longgang enamiĝis unu al la alia.



Estimi kaj vivteni gemaljunulojn, ami kaj flegi infanojn estas ja bona moralo de la ĉina nacio. Tio estis jam skribita en la geedziĝa leĝo de la nova Ĉinio kaj fariĝis kriterio de la familia vivo. Sed en la reala vivo troviĝas malmultaj homoj, kiuj malestimas kaj eĉ maljuste traktas gemaljunulojn pro sia egoismo, pro tio ke en la kultura revolucio la bonaj sociaj mora-

loj kaj moroj estis detruitaj, tial pli kaj pli multiĝis malpacoj de familioj. La filmo aperis ĝuste en tiu fono.

La intrigoj de la filmo disvolviĝis ĉirkaŭ la du ĉefaj heroinoj Shuilian kaj Qiangying kaj kontraste montris la konflikton inter iliaj malsamaj ideologioj kaj moraloj. Qiangying estas tipa drama persono kaj la fokuso de la kontraŭdiroj en la

filmo. La filmo, multe sed modere, malkaŝis kaj kritikis ŝiajn erarajn kondutojn kontraŭ la boavo kaj la bopatrino. Ankaŭ ŝi havas bonan kvaliton. Ekz., ŝi tre prizorgas kaj amas siajn edzon kaj infanojn, kaj estas laborema. Ĉio tio modlis la heroinon viva. Ĉiuj membroj de la familio implikis sin en la kontraŭdirojn troviĝantajn inter la bopatrino kaj la bofilino, inter la du bofilinoj, inter la fratino kaj la bofratino, inter la frato kaj la bofratino, kaj ankaŭ inter la geedzoj. La interplektitaj kontraŭdiroj komplikis la problemon de la familio. Ili estas traktataj kaj solvitaj ne per simpla predikado, sed en la efektiva vivo de herooj modlitaj per arta metodo.

Xin Xianling, la aŭtoro de la scenaro "Familio Plena de Ĝojo", vivas en la kamparo kaj bone konas la vivon kaj karakterojn de kamparanoj. Tiu verko spiras densan kamparan odoron.

Kvankam la filmo estas komedia, tamen la aŭtoro kaj re-



Qiangying insultas Renfang.



Shuilian admonas Qiangying sin regi.

ĝisoro ne kreis senvalorajn ridigaĵojn por veki ridojn ĉe la rigardantoj. Ili metis sian atenton sur traktadon de la herooj kaj intrigoj laŭ la logiko de iliaj karakteroj, tiel ke oni povas ĝui interesplenan kaj humoran filmon. Ekz., ironia insultado de Qiangying al aliaj ĉe la porkejo; kaŝlukto inter la fratino kaj bofratino ĉe la ŝtonponto; la sendorma nokto antaŭ la familia kunveno de famili-divido; edukado de la avo al la nepo ĉe la manĝotablo; la bato inter la geedzoj en la veterinara stacio; kverelado pri la nuligo de la geedzeco en la korto de la patrino de Qiangying. La ĝojo kaj malĝojo de la herooj en la filmo forte infektis la rigardantojn. Plejparto de la scenoj en la filmo estis fotita en la kamparo de norda Ĉinio, kaj la rigardantoj kvazaŭ estus kondukita en la nordan kamparon kaj ĝuis ĝian apartan pejzaĝon.

En printempo ĉi-jare, laŭ invito ĉinaj filmistoj vizitis Usonon kun tiu filmo. En la akcepta kunveno okazigita de la Ĉina Filmista Delegacio, ili projekciis ĝin por filmistoj, edukistoj, ĵurnalistoj kaj registaraj oficistoj de Usono. La lastaj donis al ĝi altan takson, montrante, ke la kontraŭdiroj interne de la familio montritaj en la filmo — estimi kaj vivteni la maljunulojn estas monda problemo solvenda por ĉiuj landoj, ankaŭ por Usono. Tiu filmo montras al ni, ke Ĉinio estas klopodanta por solvi la socian problemon, kiu interesas ĉiujn, kaj ke la ĉina popolo havas bonan moralon kaj etikan koncepton. Usonaj amikoj diris, ke la veraj intrigoj de la filmo estas infektaj kaj forte odoras je spirito de la ĉina nacio, tial ĝi kortuŝas ankaŭ alilandajn spektantojn.



JIN SHUI:

ĜUSTE EN TIU ĈI ANGULO...

EN la pasinteco tute alie aspektis nia angulo: makulaj muroj, malalta plafono kun polvokovritaj araneaĵoj tie kaj tie pendantaj. Ni ŝatas la angulon. Fero diris, ke ĝi estas ŝirmejo kontraŭ vento; kaj Ŝparo diris, ke ĉi tie estas varme. Kaj mi? Mi emas sidi iom fore de la fenestro, de kiu oni povas vidi domegojn de iu universitato, pordegon de iu ensemblo kaj fumtubojn de kelkaj fabrikoj. Ni ŝatas la angulon. Fero desegnas bildojn de belulinoj graciaj, dank' al kio la onkloroj akiris laboron pentri tuttage imitaĵojn de antikvaj mebloj. Kaj mi kaj Ŝparo aldonas poste esprimivajn buŝon, okulojn ktp. al la belulinoj.

Ni? Kio ni estas? Nu . . .

Frumatene, tagmeze aŭ vespere vi povas vidi nin en la profunda strateto. Ni iris triope, kun la timego renkonti naivajn infanojn.

“Panjo, rigardu!”

Ni ĉiuj ekklinis la kapon.

“Pro vundo la gamboj de la onkloroj difektiĝis, tial . . .”

Fero rapidege turnadis la radon de sia kriplula triciklo per la mano,

kaj ankaŭ mi kaj Ŝparo volis rapidigi la paŝojn. Sed neeble.

“Ĉu lamuloj?” demandis la infano.

Vangfrapo de la patrino al la infano falis kvazaŭ sur nian koron.

Malgraŭ doloro de la vunditaj membroj, ni klopodis multe pli energie ol la normalaj homoj por vivi sendepende, por reveni en la vicojn de la normalaj homoj, por ŝanĝi, per niaj propraj manoj, nian figuron de kripluloj.

Ŝajne tute sentimaj ni iris profunde en la strateto zumante kanton:

*Hodiaŭ, same kiel en aliaj tagoj,
ĝis noktomezo daŭras nia vago.
Ni iras en mallumo
kun fermitaj okuloj . . .*

Kiam printempa zefiro verdigis la salikajn frondojn, ŝi alvenis. “Mi nomiĝas Neĝo Wang. Ĉu mi povus sidiĝi ĉi tie?” Ŝi eniris en nian angulon.

“Kompreneble.”

“Se nur plaĉas al vi.”

“Kial ne?”

Ĉiu el ni respondis mallonge, malvarme. Kaj Ŝparo murmuris ĉe mia orelo per “ba”, “naŭze” aŭ io simila. La glacia rigardo de Fero ek-kaj ek-brilis post la okulvitroj. li hm-is kaj klinis sian kapon.

Ŝi estas knabino sufiĉe bela.

“Unue mi sidu ĉi tie kaj observu, kiel vi desegnas.” Fine ŝi trovis ŝancon por ekrideti al mi, ŝajne opiniante ke mi estas la malplej malafabla.

Silento regis en la angulo. Ŝia kapo estis tiel proksime de Fero kaj ŝia ŝultro tuŝiĝis kun tiu de Ŝparo. Tiuj du stultuloj tute similis al timemaj lernejoj knaboj! Kien forvaporis ilia impona digneco? Mi emis ekridi.

Ŝparo faris sinsekve plurajn fuŝstrekajn kaj Fero fuŝe desegnis be-

lulinajn harojn, ke ili aspektis kiel eluzitaj lanfadenoj.

Subite ŝi ekridis kluke.

Ni eklevis la kapon en konfuzo.

“Mi povas vidi mian propran nazon!” Ŝi proksimiĝis siajn grandajn nigrajn pupilojn serĉante la nazon sur la lante moviĝanta kapo, dum senĉese sonoritis ŝia serena rido.

Ni ĉiuj ekridis. En nia angulo ekblovitis milda vento, ŝajne iom varmeta.

Susuris silka pluveto printempa. Ekfulmis en la ĉielo.

En nia angulo ŝvebadis kantoj de la mateno ĝis la vespero . . . unue zumado milda, poste kantado mallaŭta. Mi rimarkis, ke Fero zorge ĝustigas sian buŝformon kaj Ŝparo klopodas mallevis sian mentonon, por ke lia voĉo sonu kiel riĉa baso. Mi ŝtele jetis rigardon al Neĝo kaj rimarkis, ke ankaŭ Fero kaj Ŝparo ŝtele rigardas ŝin. Neĝo milde skuadis sian kapon laŭ takto de nia kanto, tiel ke ŝiaj du harligoj mallongaj jen kurbigis jen rektiĝis. Nia kanto tiam plilaŭtiĝis:

Oldul-river', ho, Oldul-river'!

Vi scias ĉion, sed silentas,

.

“Kial tian ĉagrenan kanton?” subite diris Neĝo.

“Kia plaĉas al vi?” diris Ŝparo ekruĝiĝinte.

Neĝo ekpurigis sian gorĝon kaj ekkantis:

Tuttage ni sekigas pajlon,

ŝi tie, mi ĉi tie, fore unu

de l' alia

.

Ni tri simple ĉesigis nian laboron kaj ŝin rigardadis stupore. Kiel bela ŝi estas! Sed ŝi ne similas al la afektemaj aktorinoj, kiuj allogas spektantojn per siaj pentritaj brovoj kaj grandigitaj okuloj kaj flatas per koketaj gestoj. Kaj ŝi? Ŝi aspektas vera. Ŝia koro pentriĝas sur la vizaĝo: ŝi ne malestimas nin.

Subite Fero ekkantis:

Mi volas esti ŝafidet'

kaj ĉiam sekvi ŝin,

volonte lasos ke leĝere

ŝi ĉiam vipu min.

Neĝo ekridegis tiel forte ke ŝi perdis la spiron. “Kia kantaĉo?! Ĉu troviĝus iu kiu volontus esti vipata? Certe ĝi estas via fuŝverko . . .” Tiel senskrupule ŝi kaptis la brakon de Fero, eksvingis, svingadis.

Ĝuste kiel la kanto diras, ni kunestis de la mateno ĝis la vespero. Desegnante ni kantadis, ni kantis gajajn kantojn. Neĝo lernis avide kaj ni konkure instruis al ŝi niajn plejlertajojn. Oni ne scias de kiam, ni ĉiuj parolis al ŝi en tono de pli aĝaj parencoj:

“Neĝo, ne iru la stratetojn, kiam vi hejmeniras vespere.”

“Neĝo, vi devus lerni fremdan lingvon. Ĉio dependas de la klopodoj. Ne timu malfacilojn.”

“Neĝo, vi devas tiel trakti la vivon, malsame al ni, vi . . .”

Kaj Neĝo? Ĉiufoje je tia okazo ŝi aspektis aparte gaja, aŭ elpoŝigis kelkajn bombonojn kaj ilin metis antaŭ nin, aŭ infuzis por ni po tason da aroma teo.

“Ĉu premio, knabineto?”

“Ne!” ŝi ridis naive, “puno.”

“Puno?”

“Kial vi diris, ke mi estas malsama al vi?”

Ni denove silentiĝis. La bombonoj dolĉis, sed la koro tristis.

“Mi . . . mi ja diris nenion maldecan, ĉu mi diris ion tian?” Ŝi ekrigardis nin kaj mallevis siajn okulojn. “Mi volas diri, ke ankaŭ vi devas vivi tiel, ĉu mi malpravas?”

Ekde tiam, ĉiutage Neĝo venis al la laborejo 30 minutojn pli frue ol la fiksita tempo por ĝin balai, purigi nian angulon. Malaperis la polvo ĉe la anguloj de la ĉambro

kaj sur la makulaj muroj ŝi pendigis belan kalendaron. Iom post iom ankaŭ ni tri alvenis al la laborejo pli frue, ĉiam pli frue tagon post tago, unu ol alia. En la komenco ni ne konsciis la kaŭzon de tio. Sed kiam mi rimarkis, ke aperis certa malintimeco inter ni tri, mi ekvidis, ke tion kaŭzis subkonscia jaluzo. Ĉiu el ni deziris kunesti kun Neĝo iom pli longe — ok horoj en unu tago estis tro malmultaj!

Tion vidinte mi ne plu iris al la laborejo antaŭ la fiksita horo. Mi ja ne estas tia nobla amkonkuranto kian priskribas romanoj. Ĝuste pro mia profunda amo al Neĝo, nature konstruiĝis en mia koro defenda fortikaĵo — tia amo absolute ne povas sukcesi.

Ankaŭ Fero kaj Ŝparo ne plu alvenis antaŭtempe al la laborejo. Ho, ili tiel pensis same kiel mi, mi estis certa pri tio!

Sed Neĝo estis ankoraŭ knabine-to, kaj ŝi tute ne divenis la kaŭzon de tiuj subtilaj ŝanĝoj. Iun someran vesperon, ŝi petis, ke ni iru kun ŝi al proksima parketo por rigardi filmon sub libera ĉielo. Alte tenante kvar biletojn, ŝi diris: “‘Dolĉa Afero’ estas bonega filmo, do iru kun mi!”

Fero skuis la kapon. Ŝparo diris: “Ankaŭ mi ne iros. Kio ja dolĉas por mi?”

“Do vi iru, nu?” ŝi diris al mi. “Post la filmo mi devos iri tra vojo tre malluma . . .”

“Ĉu vi timas?” ni demandis samtempe.

Ŝi kuntiris la brovojn kaj honeste balancis la kapon: “Jes.”

Ni konsentis iri kun ŝi. Mi sentis ian fieron pro tio, ke mi povas ŝin protekti. Eble ankaŭ Fero kaj Ŝparo tiel sentis la samon.

En la parketo susuris la vespera venteto, disportante moderan aromon de floroj. Jam kiom da jaroj? Jam kvin jaroj! Post kiam mi alprenis la du lambastonojn, mi ne-



Ilustrita de **LŬ JINGREN**

nam iris tien. Por kio mi irus tien?

Ankoraŭ ne mallumiĝis. Antaŭ la ekrano sidis nur kelkaj geknaboj kun okuloj suprendirektataj al la blanka ekrano. Ankaŭ Fero kaj Ŝparo silentadis.

Neĝo subite ekridis brue.

En la boskoj geamantoj promenis, sin apogis unu al la alia, kisis unu la alian.

“Ne ridu, ankaŭ vi tiel faros.” Mi ne scias kial mi diris al ŝi eĉ tion.

“Ba, tion mi ne faros!” Neĝo tute ruĝiĝis kaj murmuris.

Tiam Fero ellasis alian nedecan diron: “Neĝo, ĉu vi ne sentas humiliĝon kunestante kun ni?”

“Humiliĝon? Kial?” Neĝo eksaltis, plukis kelkajn foliojn kaj petoleme ilin ŝovis en la kolumon de Ŝparo.

“Ĉu vi ne timas?” mi demandis.

“Timi? Kion?” Neĝo donis al mi pugnoboton. Ŝi tenas cerambikon en la mano. Ho, mi dezirus, ke ŝi ĉiam restu tia knabineto.

“Nu, mi volis diri, ĉu vi ne sentas timon en nokto?”

“Ba, ba!” ŝi iom hontiĝis. “Ĉu ni rigardos la filmon?”

Zumante kanton, ni iris returnen laŭ vojeto. Tenante la cerambikon en sia mano, Neĝo senĉese babilis al ni pri diversaj aferoj, novaj, ridindaj. Subite mi eksentis, ke la mondo estas tiel bela kaj tiel dolĉa, ke ni fariĝis tri gajaj fratetoj akompanantaj amindan fratineton.

Ŝi vere similis al fratineton kaj tuj post la komenco de la filmoprezentado ŝi ekridadis gaje, firme tenante mian lambastonon. Kiel mi deziris, ke la tempo haltu, ke ni povu ĉiam tiel kunestadi kaj forgesi ĉion . . .

Foje mi vere forgesis min kaj por levi falintan lanfadenan bulon de Neĝo, mi forlasis la lambastonojn kaj min klinis, etendis la manojn kaj ĉasis ĝin kiel normala homo. “Frap!” mia brako eksangis kontuzite de ŝtono . . . Neĝo preskaŭ eklarmis pro afliktiĝo kaj ekridetis nur pro mia brava mieno de spite-mo . . .

Iutage, Neĝo subite deprimiĝis de zorgoj kaj silentadis stupore kaj suspirante de tempo al tempo. Ni pridemandis ŝin, sed ŝi hezitis malkaŝi al ni la veron, kaj ŝi iom ruĝiĝis jetante sian rigardon al ni.

“Diru al ni, kio ĝenas vin,” diris malpacience Fero. “Ĉu iu ofendis vin?”

“Kiu? Diru al mi!” Ŝparo preme krakigis siajn fingrojn.

“Neniu, neniu ofendis min.” Ŝi balbutis. “Sed panjo insistas, ke mi intervidiĝu kun iu viro . . .”

Fariĝis absolute silente en la angulo.

“Universitata studento, rekomendita de mia onklino . . .”

Mia koro kvazaŭ falis en sekan puton. Mi ne povas diri, kio venis en mian penson en tiu sekundo. Ŝajne mi pensis nur pri la morgaŭo. Kiel ni vivos morgaŭ? Mi deziregis cigaredon. Fero kaj Ŝparo jam bruligis po cigaredon kaj transdonis al mi la fajrilon.

Tamen Neĝo direktis al ni sian helpopetan rigardon. “Ĉu mi devas iri vidi lin?” Ŝi demandis timete.

Neĝo estas bona knabino kaj devas havi pli multe da feliĉo ol la aliaj. Ŝi estas naiva kaj tute ne pensis eviti nin. Ĉu ni tamen devus difekti ŝian feliĉon?

“Mi ne volas, tio tute ne interresas . . .”

“Vi devas,” Fero la unua reakiris sian prudenton.

“Amo ja interresas,” mi diris, “ĝi feliĉigos vin, akcelos vian laboron kaj lernadon, ĝi faros la mondon bela . . .”

“Jes ja!” diris Ŝparo.

Tiuvespere, kiam ni kune iris tra la strateto ni denove ekzumis la kanton, kiun ni forgesis dum la tuta somero:

*Hodiaŭ, same kiel en aliaj tagoj,
ĝis noktomezo daŭras nia vago.
Ni iras en mallumo
kun fermitaj okuloj,
kaj kvazaŭ aŭdas mildan vokon
de l' folioj:*

Amikoj, venu al mi por trankvilo.

Dum laboro en la sekvanta tago, Neĝo ŝajne klopodis trovi ŝancon por ion diri al ni tri aparte. Ne diru, Neĝo, mi vere iom timas. Ŝi ridetis al ni, tiel senzorge, ke mi sentis, kvazaŭ mia koro estus premata de glacia mano. Mi foje kaj refoje atentigis min: Ĉu mi ne devas ĝoji pro la feliĉo de la fratineto?

“Kantu, Fero,” mi proponis.

“Jes, ni cantu, Ŝparo,” diris Fero.

Sed ni kantis nenion, ni ne povis kanti.

Dum la laborpaŭzo Neĝo fine trovis ŝancon kaj haste diris al ni: “He, mi vidis la viron hieraŭ vespere, mi rifuzis lin.”

Ni ne komprenis ŝin en la momento kaj rigardis unu alian kun streĉita koro. Subite Fero tiel ekridegis, ke li disŝprucigis la akvon el sia buŝo sur la plankon.

“Vere, mi ne trompas vin.” Jen kiel ŝi malpacienĉigis!

“Tio signifas, ke vi ne konsentis, nome vi tute ne konsentis amikiĝi kun li. Ĉu ne?” Ŝparo demandis min kun tre gaja mieno.

“Kial vi ne konsentis?” mi demandis.

“Lia mieno radiis dignecon, kvazaŭ li estus altrangulo, kaj liaj vortoj plenis je filozofiaĵo. Ho, indulgu min, mi ja ne bezonas laŭleganton de ĵurnaloj.” Neĝo maŝinpafile eldiris ĉion en unu spiro kaj grimacis al ni per la nazo.

Mi trovis ke mi jam zumas kanton. Pro kio? Ĉu mi ĝojigis? Se ŝi estus mia propra fratineto? . . . Same, mi certe ne konsentus, ke ŝi edziniĝu al tia homo.

Ni denove komencis vizitadi la malgrandan parkon. En tiu parketo ni kune pasigis sennombrajn dolĉajn vesperojn. Neĝo multe multe interparolis kun mi. Kiajn filmojn ni rigardis? Mi jam ne memoras. Mi memoras nur la subirantan sunon, vesperan venteton, helan lunon, abundon da steloj, mi memoras nur, ke tagon post tago ni pli amas ĉion ĉirkaŭ ni, same kiel ŝi.

Mi pensas hodiaŭ, ke tiu periodo estas vere memorinda . . .

Universitato? Ho, jes. Neĝo poste sukcese trapasis eniran ekzamenon de universitato. En tiu aŭtuno, Neĝo kverelis nepacigeble kun sia patrino — ŝia patrino insistis, ke ŝi amikiĝu kun la studento.

Ĉiuvespere, lampoj brilis en nia angulo. Fero kaj Neĝo desegnadis kaj kalkuladis, sin klinante ĉe la tablo. Kaj mi? Mi donis al ŝi lecionojn pri gramatiko, subjekto, komponado, kaj mi ankaŭ verkis por ŝi 7-8 modelajn artikolojn. Nur Ŝparo senvorte sidadis ekster la pordo, prizorgante fornon por boligi al ni akvon kaj enŝovis sian kapon kaj envie ekridetis aŭdinte niajn ridojn. La bluaj flamoj lekadis la fundon de la kruĉo, eligante mallaŭtan zumadon.

Kiel plaĉe milda lamplumo. Tian lumon mi vidis nur en mia infaneco, kiam panjo kisis min je la kolo post reveno de sia deĵoro. Kial oni ne bruligis tiajn lampojn en la tuta ĉirkaŭa mallumo?

En iu nokto ni ekkantis “La Lamplumon”:

*Nokte junulino
adiaŭas ĉe ŝtuparo
armeanon, kiu iros
al batalo . . .*

Subite la voĉo de Neĝo ekrema-dis kaj larmoj ruliĝis en ŝiaj okuloj: “Se mi eniros en universitaton en alia loko, ni do ne plu povos vivi kune.”

Falstelo subite strekis blankon en la ĉielrando kaj malaperis. Neniu el ni tri parolis, kvazaŭ ni ekkonsciis tion nur nun.

“Ĉu vi skribos al mi?”

Bruadis la kriplula triciklo de Fero kaj la lambastonoj de mi kaj Ŝparo.

“Nur unu peton mi havas al vi . . .” ŝia voĉo sufokiĝis.

“Jes, Neĝo, ni skribos al vi!” ni tri diris rapide.

Ni preterpasis stratlampon kaj vidis la ĉagrenan vizaĝon de Neĝo. Ni ne trankviligis ŝian koron. Ni preterpasis alian stratlampon kaj Neĝo diris kun ŝajnigita ĝojo: “Eble mi ne sukcesis en la ekzameno!”

Subite mi sentis, kvazaŭ io frapegis mian koron. “Trankviliĝu, Neĝo,” mi diris, “ni . . . ni vivos bone!”

Mi vidis, ke la okuloj de Neĝo ekbrilis.

En vintro, Neĝo vere forveturis aliloken por studi en alta lernejo — medicina instituto. Ŝi diris foje: “Kial estas tiel multaj hospitaloj kaj tamen ili ne povas kuraci viajn gambojn?” Tra fenestro de vagono veturonta al suda Ĉinio ŝi diris al ni serioze: “Atendu min, mi portas kun mi ĉiujn viajn registrojn de malsano.” Ni ŝvingis niajn manojn al ŝi por adiaŭo, kiel ni adiaŭis en knabeco niajn pli junajn gefratojn irontajn al lernejo. Ŝajnis al ni, ke ŝi ne veturos al malproksima suda Ĉinio, sed al loko proksima, de kiu ŝi povos reveni iam ajn.

Jen, ĝuste en tiu ĉi angulo. Kaj tiu bela kalendaro estis pendigita de Neĝo Wang en sia tempo. Estas neniam da polvo sur ĝi? Kompreneble. Ni neniam plu kantis la ĉagrenajn kantojn.




La inaŭguro de la kongreso okazas en la Parla-
mentejo de Brazilo. Ĝin prezidas vicprezidanto de
Brazilo D-ro Aureliano Chaves (meze).

En la 66-a Universala Kongreso de Esperanto

Fotoj de NAN YOULI kaj TAN XIUZHU

Vicprezidanto de ĈEL Chen Yuan prelegas en la Kongresa Universitato.





Membroj de la Ĉina Esperanto-Delegacio kun estraranoj de UEA




Dum la kongreso membro de la Ĉina Esperanto-Delegacio Nan Youli intervjuas ĉilian peranton de EPC s-ro Ivan Mättig.

Usona samideanino s-ino Harmon (la kvina de maldekstre) regalis la membrojn de la Ĉina Esperanto-Delegacio per vespermanĝo. Jen diverslandaj samideanoj fotiĝas antaŭ la vespermanĝo.



Ĉefredaktoro de EPC Zhang Qicheng kunsidas kun parto de legantoj kaj perantoj de la revuo en Latin-Ameriko dum la kongreso.



Membroj de la Ĉina Esperanto-Delegacio Zhang Qicheng (maldekstre) kaj Tan Xiuzhu (meze) interparolas kun s-ro Baldur Ragnarsson, vicprezidanto de UEA.



Ĉinaj esperantistoj kun brazilaj samideanoj

Dum kongresa ekskurso



Grimpado


sur glava ŝtuparo

Fotoj de QU WEIBO

Tio ĉi estas tradicia popola sporto de la ĉinaj lisu-oj. Oni ligas 42 akrajn glavojn kun klingoj supren al du stangoj altaj je 30 metroj, kaj tiel formiĝas ŝtuparo. La ludantoj grimpas supren nudpiede ĝis la supro kaj descendas kun manoj kaj piedoj nekvinditaj, kio montras bravecon kaj arton de la ludantoj.

Grimpado sur glava ŝtuparo

Farado de glava ŝtuparo



En la naturparko

Fanjing-monto

SE vi veturas per aviadilo de Guiyang nordorienten, viajn okulojn tuj frapas rava bildo: Subite leviĝas la montoj, kiuj vidiĝas tra la ŝvebantaj nuboj. Altaj montpintoj kvazaŭ akraj spadoj skrapantaj la ĉielon; kaj la verda montkorpo sin kaŝas en la densaj nuboj, ĝi estas Fanjing-monto, la ĉefa pinto de Wuling-montaro.

La nomita monto kun perimetro de 240 km. situas en la nordorienta parto de Guizhou-provinco kaj altas je 2,572 metroj super la marnivelo. Ĝi estas unu el la 71 naturparkoj de Ĉinio.

En la historio ĝi estis unu el la famaj montoj pilgrimataj de ĉinaj budhistoj. Legendo diras, ke en la 16-a jc. Imperiestra Patrino Li de Ming-dinastio budhistiniĝis tie. Eĉ nun ĉirkulas multaj belaj legendoj pri la tieaj pitoreskejoj Naŭimperiestra Groto, Ora Pinto en la Ruĝa Nubo, Kronprinca Rokego k. a.

La monto allogas la turistojn per sia majesteco, groteskaj rokoj kaj ĉarmaj pejzaĝoj kiel la Ora Pinto en la Ruĝa Nubo, Feina Ponto, Naŭimperiestra Groto, Draka Kaverno, Trezora Rokego k. a. Variema kaj impona estas la "Budha lumo de Fanjing" formita de sunbrilo tra vaporo


en la aero. Surgrimpinte la Oran Pinto en Ruĝa Nubo kaj rigardante foren, oni vidas ke ĉiuj montpintoj vualitaj de nebuloj sin banas en sunbrilo. En la regiono interkruciĝas riveroj, prosperas antikvaj arboj kaj diversaj vegetaĵoj. Printempe kaj aŭtune disfloras la rododendroj kaj aliaj sovaĝaj floroj, kiuj turnas la monton en floran maron. La loko estas vere plezuriga kaj alloga.

La naturparko situanta en subtropika zono estas granda


verda trezorejo, kie la varmeta klimato, abunda precipitaĵo, bona ekologia medio kaj longa senprujna periodo tre favoras la kreskon kaj generadon de la vegetaĵoj.

Post scienca esplorado oni trovis tie pli ol 2,000 specojn da atklasaj vegetaĵoj. Iam praarbaroj en ĝi estas kompare bone rezervitaj en nia lando. Lastatempe la sinteza scienc-esplora grupo por media protektado trovis grandan areon da primitiva abiaro sur la norda deklivo de la nomita monto kaj pecojn da primitivaj etfoliaj buksaroj en pli alta loko de la suda deklivo. Ĉio ĉi tio montras la antikvecon, tipecon kaj kompletecon de la tieaj arbaroj kaj aliaj vegetaĵoj.

En la vastega primitiva arbaro de Fanjing-monto kreskas multaj antikvaj kaj raraj vegetaĵoj de Ĉinio, inkluzive de la fame konata bela kolombarbo (*Davidia involucrata*). Tiu abro kun alteco de 14-15 metroj por-



En praarbaro



Abio sur la monto Fanjing

tas blankajn florojn, kiuj aspektas kiel flugantaj blankaj kolomboj, tial oni donis al ĝi la nomon. Ĉijare en la tiuflanka esplorado al la monto oni trovis primitivan kolombarbaron. Tie estas raraj kaj valoraj vegetaĵoj, kiaj altaj lagerstroemioj (*Lagerstroemia indica*), taksusoj (*Taxus cuspidata*) kaj longburĝonaj cugoj, kreskantaj sur altaj krutajoj.

Tie abundas ankaŭ valoraj ĉinaj drogoj ekz. pseŭdo-ginsengo (*Panax pseudo-ginseng*), gastrodo (*Gastrodia elata*), ligustieumo (*Ligusticum wallichii*), larĝfolia levistiko, eŭkomio (*Eucommia ulmoides*) kaj aliaj sume 180 specoj, pro kio la monto ĝuas reputacion de natura drogolando. Tie kreskas ĉie blankaj orefungoj kaj aliaj

mangeblaj fungoj, multe produktiĝas kruda lako, sovaĝa parfumo kaj altklasaj materialoj por fabriki paperon.

Koncerne la animalojn, tie vivas 57 specoj de grandaj kaj mezgrandaj bestoj, inter kiuj griza orhara simio, sudĉinia tigro, nuba leopardo (*Viverra zibetha*), kaj aliaj sume 17 specoj estas listigitaj kiel raraj bestoj protektataj de la ŝtato. La orhara simio estas unuaklasa protektata animalo de Ĉinio. Nun estas tri specoj de ĝi en la mondo, kaj tiu de Fanjing-monto portas grizajn harojn kaj estas rekonata de la mondo kiel valora kaj rara specio de simio. Nun troviĝas nur ĉ. 200 tiaj simioj en la primitiva arbaro de Fanjing-monto. Antaŭ nelonge la esplora grupo sesfoje proksi-

miĝis al orharaj simioj por observi kaj esplori iliajn vivajn kutimojn kaj kondiĉojn. Ankaŭ la sudĉinia tigro estas unuaklasa protektata animalo de la ŝtato. Tiu bestospeco preskaŭ pereiĝinta nun havas tendencon plimultiĝi en la nomita regiono. Krome en tiu regiono vivas nemalmulte da raraj birdoj, kiaj longvostaj fazanoj, ruĝbrustaj kaj blankbrustaj tetroj k. a. En la riveroj vivas multe da akvaj animaloj, fiŝoj kaj amfibioj.

En la regiono abundas pluvo, la jara precipitata kvanto superas 2,000 milimetrojn kaj tiu en la centra loko atingas 2,500 milimetrojn. Tie estas ankaŭ riĉaj fontoj de akva energio. La ok disetendiĝantaj riveroj enfluas en Changjiang (Jangzi)-rivero tra la riveroj Yuanjiang kaj Wujiang. Ili liveras abundan akvon al la loka agrikultura produkto. Dank' al la arbaroj, kiuj bone rezervas akvon kaj reguligas la klimaton, formiĝis tie bona natura ekologia medio. Kvankam en multaj lokoj de la nomita provinco ofte okazas sekegeco, tamen en la regiono de Fanjing-monto kaj ĝiaj ĉirkaŭaj gubernioj ĉiam favoras la klimato, kio garantias stabilan pliprodukton de grenoj.

La nomita naturparko karakteriziĝas per sia sintezeco. Tie la natura ekologia sistemo estas kompleta kaj la natura heredo klara. Ĝi estas tipo de centra-azia natura zono. Tie troviĝas ne nur multaj specoj de vegetaĵoj, sed ankaŭ konserviĝas la geologia sekcio formita de la geologia moviĝo kaj aliaj historiaj spuroj de la natura ŝanĝiĝo. Tial la nomita regiono estas aparte grava por scienca esplorado kaj estas bona bazo por sciencaj esplorado kaj edukado.

NOVA SERIO DA GIMNASTIKAJ EKZERCOJ PER RADIODISAŬDIGO

En la 1-a de septembro de la kuranta jaro la Korpokultura kaj Sporta Komisiono de la Ĉina Popola Respubliko publikigis la 6-an serion da gimnastikaj ekzercoj per radiodisaŭdigo kaj postulis, ke la popolo aktive ĝin pratiku.

Tiu ĉi serio inkluzivas 9 specojn de movoj, kiel korpoetendiĝo, membro-movo, brustostreĉo, korpofleksoj ktp. La movoj estas simplaj, elegantaj kaj fortostreĉaj.

LA 13-A AZIA HALTERLEVA ĈAMPIONECA KONKURSO EN JAPANIO

La nomita konkurso okazis en Nagojo de Japanio de la 16-a ĝis la

19-a de aŭgusto de la kuranta jaro. La ĉina teamo per 321 poentoj gajnis la teaman unuan lokon kaj rompis 1 mondan rekordon kaj 3 aziajn rekordojn; gajnis 18 orajn, 10 arĝentajn kaj 1 kupran medalojn.

La teamo de suda Koreio per 236 poentoj gajnis la teaman duan lokon kaj la japana teamo per 224 poentoj la trian lokon.

ATINGOJ DE ĈINAJ SPOR- TISTOJ EN LA MONDA NAVIGMODELA KONKURSO

En la Dua Monda Navigmodela Ĉampionea Konkurso la ĉina sportisto Wei Yuming per 193.33 poentoj gajnis la ĉampionecon de radie telestirata navigmodela (F2 B) konkurso. Krome ĉinaj sportistoj ankaŭ gajnis du subĉampionecon kaj 1 trian lokon.

La ĉifoja konkurso okazis de la 19-a ĝis la 23-a de aŭgusto de la kuranta jaro en la urbo Magdeburgo de GDR. La ĉinaj sportistoj par-

toprenis en la konkursoj de 8 disciplinoj.

MANS AKCEPTIS ĈINION KIEL MEMBRO-LANDON

En aŭgusto de la kuranta jaro la Monda Asocio de Navigmodela Sporto akceptis la Ĉinan Ligon de Naviga Sporto kiel sian membron. Tiu ĉi decido estis unuanime aprobita en la kongreso de MANS okazinta en Magdeburgo de GDR.

ĈINIO OKAZIGIS KONKURSON DE SUBAKVA NAĜO

Ekde la 6-a ĝis al 11-a de aŭgusto de la kuranta jaro, en Shenyang (Senjang), Ĉinio okazigis la Ĉinan Konkurson de Subakva Naĝo de 1981. Dum la konkursado 17 sportistoj en 49 fojoj rompis 13 tutlandajn rekordojn. En la konkursoj de 21 disciplinoj la teamoj de Liaoning (Liaŭning), Guangdong kaj Hubei (Hubej) akiris respektive 14, 6 kaj 1 orajn medalojn.

LA BEIJING-A INTERNACIA MARATONA KONKURSO

La nomita konkurso de 1981 okazis je la 27-a de septembro en Beijing. Ĝin partoprenis 75 maratonistoj de Aŭstralio, Kanado, Finnlando, Italio, Japanio, Kenjo, Norvegio, Koreio, Svedio, Tanzanio, Usono kaj Ĉinio. Sveda maratonisto Kjell Erikstahl gajnis la unuan lokon per 2:15'20", norvega maratonisto Inge Simonsen la duan kaj korea maratonisto Li Jong Hyon la trian.



Ĉinaj Proverboj

La justa multe ricevas hel-
pojn, la maljusta ne.

Gutoj post gutoj eĉ ŝtonon
traboras.

Post damaĝo kreskas saĝo.

Sen tigroneston eniri ne eblas
tigridon akiri.

Pli klare vidas apudaj rigar-
dantoj ol la ŝakludantoj.

Notoj pri Aŭtuna Festo de Mjaŭ-nacieco

de PENG ZHENGYANG

EN aŭgusto ĉijare, invitite de ĵurnalistoj-kolegoj de la Tuĝja-Mjaŭ-Aŭtonoma Subprovinco de Okcidenta Hunan, mi interesplene venis en la gubernion Huayuan de tiu subprovinco por ĝui la tradicionan Aŭtunan Feston.

La subprovinco situas en regiono, kie abundas altaj montoj. La prapatroj de la tuĝja-oj kaj mjaŭ-oj, kiuj loĝas en la montaro, devis fuĝi tien unuj post aliaj pro netolerebla subpremado de la feŭdaj registaroj de diversaj dinastioj. Ili estas bonkoraj, honestaj, diligentaj, kuraĝaj kaj lertaj en kantado kaj dancado. Kaŭze de sia longtempa izoliteco ili

formis proprajn tradiciojn kaj mo-rojn. La nomita tradicia festo de la mjaŭ-a popolo okazas ĉijare ĉe la Aŭtunkomenco antaŭ la rikoltado.

Ĝi estas solena kunveno por celebri rikolton, festivalo de mjaŭ-aj tradiciaj artoj kaj ankaŭ la plej bona ŝanco por la gejunuloj elekti amat-(in)ojn per kantado. Ĉijare la festivalo okazis en tri lokoj kaj en tri sinsekvaj tagoj, la centra kunveno sin trovis en la komunumo Dongmaku de la gubernio.


Frumatene de la sesa de aŭgusto, mi aŭte veturis al la kunveno de la festivalo. Veturante laŭ la serpentuma ŝoseo, mi vidis sennom-

brajn homojn kolektiĝantajn unuj sekvante aliajn al la ŝoseo de ĉiuj montaj vojstrekoj. Inter ili estis knabinoj en vestoj borderitaj per belaj pasamentoj, kun arĝentaj ornamajoj kaj bluŝtofa sunombrelo en mano, junuloj en novaj vestoj kaj kun flava saketo pendanta de ŝultro, virinoj dorsportantaj korbojn kun bebo ene kaj ankaŭ viroj vektoportantaj korbetojn kaj arĝentharaj gemaljunuloj. Ili ĉiuj ĝoje babilante marŝis al la kunveno kvazaŭ torento el homoj.

Ĉirkaŭ la oka mi atingis la kunvenejon de Dongmaku kaj vidis, ke pli ol dekmil kunvenantoj el



Geamantoj en flanka kunveno



diversaj lokoj el la ĉirkaŭaĵo de ĉ. 50 km. tiel plenplenigis la vilaĝon kun nur kelkcent kamparanaj familioj ke "eĉ akvo ne povus ĝin traflui" laŭ ĉina popola diro. Sur la sennombraj standoj estis montrataj diversspecaj agrikulturaj kaj flank-okupaj produktaĵoj, arĝentaj ornamaĵoj, broditaj pasamentoj, almanĝaĵoj kun nacia gusto, metiartaĵoj kaj instrumentoj. Jam komenciĝis la konkurso de kantado, ludo sur balanciloj, prezentado de luktoartoj, la danco "simia tamburado" kaj aliaj.

Sur la kantokonkursa podio sensecese laŭte sonoris belaj kantoj. Pro multnombro de la kantistoj, sur la podio kantis plejparte veteranaj kantistoj. Generale tiuj kantistoj, kiuj ne estis instruitaj de majstroj, ne kuraĝis sin montri tie. La mjaŭ-a nacieco ne havas sian propran skriban lingvon, sed tre riĉas ĝia folkloro literaturo, kiu herediĝas de generacio al generacio en formo de kantoj. Laŭ enhavo tiuj kantoj povas klasifikiĝi en antikvajn legendojn, kantojn por bonvenigi gastojn, amkantojn, geedziĝajn kantojn, infanajn kantojn, funebrajn

kantojn kaj kantojn pri laboro en malsamaj sezonoj. Per kantoj ili esprimas siajn sentojn en geedziĝaj kaj funebraj ceremonioj kaj amindumado. La podio de la aŭtuna festivalo ja havigas al ili bonan ŝancon por montri sian talenton.

Ĉe la placo por "simia tamburado" tondris tamburego kun diametro de 1.2 metroj. La tamburanto imitadis sovaĝan simion, jen saltante, jen petolante, jen gratante siajn orelojn, jen gestante kiel simio ŝtelanta maizojn, kaj tio vekis ridegojn de la rigardantoj. Legendo diras, ke nelonge post kiam mjaŭ-nacieco transloĝiĝis de la Loesa Altebenajo al la gubernio, ekaperis sur la monto terura monstro kun blua vizaĝo kaj elstaraj dentegoj, kiu mortigis precipe mjaŭ-ajn infanojn. Poste la mjaŭ-oj ĝin mortigis per ruzajo kaj senhaŭtigis, kaj el ĝia haŭto faris tamburegon. Ili batis la tamburon kaj dancis imitante movojn de simio por celebri sian venkon. Ekde tiam la nomita danco herediĝis kaj disvolviĝis kun paso de tempo. Nun tiu danco estas prezentata unuope, duope aŭ kvarope. Krom imiti gestojn de simio en la danco oni prezentas ankaŭ la produktadon de la mjaŭ-oj kaj iliajn sentimentojn de ĝojo je livero de greno al la ŝtato. La 62-jara artisto Shi Chengye estas fama tamburisto de la gubernio. En la sesdekaj jaroj li dufoje venis al Beijing por prezenti tiun dancon kaj feliĉe intervidiĝis kun prezidanto Mao kaj ĉefministro Zhou.


La mjaŭ-oj ŝatas tamburi. Mi propraokule vidis multajn virinojn kiuj prepenetrante la ĉirkaŭrigadantan homamason kaj kaptinte la frapilojn tamburadis kaj dancis ĝis plena kontentiĝo. Oni diris al mi ke en la malnova socio la virinoj estis malpermesitaj tamburi, sed nun ili jam povas tion fari senĝene. Iliaj graciaj movoj kaj senĝena esprimo de sentoj dronigis min en senlima ĝojo.

Ludi balancilon estas la plej ŝatata el la festaj aktiva-

doj. Ĉe angulo de la homplena kunvenejo alte staris la subtenilo de la balanciloj kaj flirtis koloraj flagoj. Oni diris, ke sen ludo de balancilo la kunvenantoj ne volontis foriri. La tiea balancilo havas apartan formon (vidu la foton pri ĝi). Kiam ok gejunuloj samtempe surbalanciliĝis, ĝi estis turnata de kvar personoj. En aplaudado kaj bruado rapidiĝis la turniĝo. Subite ĝi haltis kaj iu maljunulo estis levita al la supro de la subtenilo, kio vekis ridegon inter la rigardantoj. Tiam la maljunulo aplombe ekkantis mjaŭ-naciecan kanton laŭ la regulo. Finiĝis la kanto kaj la radego denove ektorniĝis. Kiu ne povoscias kanti mjaŭajn kantojn, ne kuraĝas surbalanciliĝi. Sed la mjaŭ-oj lertaj en tiu ludo povas eviti la kanto-punon iel eskapante el la plej alta pozicio sur la rado je ĝia halto. Tamen troviĝas ankaŭ iuj, kiuj volas laŭte kanti kaj ĉiamaniere klopodas por sin haltigi ĉe tia pozicio; ili plejparte estas enamiĝintaj geknaboj.

Inter la mjaŭ-oj cirkulas jena interesa legendo pri la deveno de la balancilego por ok personoj: Antaŭ tre longe, en iu nekonata mjaŭ-a vilaĝo vivis bela knabino Nielang. Saĝa kaj lerta, ŝi faris unu paron da elegantaj ŝuoj. Iutage, aglo subite sin ĵetis surteren kaj forportis per la beko unu ŝuon, kun kiu ĝi flugis trans montojn kvazaŭ tenante faskon da freŝaj floroj. Tion rimarkis la mjaŭ-nacieca heroo Baguidare, ĉasanta en profunda montaro, kaj faligis la aglon per sago. Li prenis la ŝuon kaj estis mirigita de la belege brodita kaj aroma ŝuo. Li pensis ke tian brodaĵon povas fari nur saĝa, bonkora kaj ĉarma knabino. Li tuj enamiĝis en tiun nekonatan knabinon kaj decidis ŝin trovi. Tial li inventis balancilon por ok personoj por ke la knabinoj ludu ĝin kaj ĉe tio li trovu la brodinton de la ŝuo. Informiĝinte pri tio la knabinoj el ĉiuj vilaĝoj kolektiĝis tien por ludi balancilon kaj partopreni konkurson pri kantado ĉe la Aŭtunkomenco.

Sur balancilego



En tiu ĉi rubriko ni aperigas recenzojn pri Esp-ajoj, kiujn la eldonistoj sendis al ni po-du-ekzemplere, kaj nur mencias tiujn ricevitaĵojn po-unu-ekzemplere. Ni ankaŭ bonvenigas recenzojn faritajn de alilandaj seriozaj samideanoj kaj ilin rekompencas pro la kontribuajtoj per niaj Esp-aj eldonaĵoj aŭ ĉinaj me-tiartaĵoj. La redakcio ne prenas sur sin la respondecon pri la laŭdoj aŭ kritikoj de la recenzantoj.

La Red.

“La Faraono” en bildoj

“LA FARAONO”, bildrakonto kun teksto kompilita de Vilmos


Benczik, eldonita de la Hungara Esperanto-Asocio. 16.5 cm. × 23.5 cm. 44 p. kun 138 bildoj kaj kolora kovrilo. Prezo 4.80 ned. gld. Havebla ĉe la eldoninto.

La historia romano “La Faraono” de la eminenta pola prozisto B. Prus priskribas unu el la plej interesaj epizodoj de la antikva Egiptio. Ĝia Esperanta tradukaĵo farita de Kabe estas stilmodelo por la Esperanta prozo. Kvankam tiu ĉi bildrakonto ne povas aperigi la detalojn de la ampleksa romano, nek eksponi la lingvon de Kabe, tamen ĝi prezentas al la legantoj la ĉefan linion de la agado kaj per pluraj pruntitaj frazoj el la plumo de Kabe iom prezentas lian stilon. Por tiuj, kiuj jam konas la plenan verkon, ĝi povas servi kiel revivigilo de la memoro.

La bildoj en nigro kaj blanko estas sufiĉe vivecaj en stilo de forta kontrasto de lumo kaj ombro kaj impresantaj per movpleneco. La preso estas klara kun malmultaj eraroj, kiel ekzemple en la 72-a bildo “la patroj” (la pastroj), en la 100-a bildo “sangŝucantaj kalkvuloj”

(sangŝucantaj kalvuloj) kaj en la 103-a bildo “imperon” (imperion), kiuj ne malhelpas la legadon. Mi trovis la libreton rekomendinda al legemuloj, precipe al tiuj kiuj ankoraŭ ne konas la plenan romanon, ĉar eble ĝi kondukos ilin al lego de tiu eminenta tradukaĵo.

Recenzis LAŬLUM



La juna heroo trovis la brodistinon Nielang kaj ili feliĉe geedziĝis. Ekde tiam la mjaŭ-oj ĉiujare faras balancilojn ĉe la Aŭtunkomenco kaj okazigas solenan kunvenon.

La aŭtuna festivalo alportis senliman ĝojon al la mjaŭ-oj, precipe al la gejunuloj, kiuj aŭ konkure elmontras siajn lertaĵojn kaj laŭvole prezentas programerojn por gajni la koron de knabinoj, aŭ enmiksiĝas en la homamasojn por amindumado. Se iuj gejunuloj ekplaĉas unu al la alia, ili sin forturnas de la brua homamaso en verdan arbaron. La mjaŭ-oj nomas tion “fari flankan kunvenon”.

Post la 6-a horo posttagmeze, plej ardiĝis la flankkunvenoj. Tiam mi vidis, ke multaj paroj da geamantoj

promenas kun dolĉa kanteto aŭ sur montdeklivo aŭ sur pado. Mi silente sekvis ilin por vidi kio okazos, tamen, kiam mi estis alproksimiĝanta al ili, ili plejparte kaŝiĝis kun hontemo, ĉesigante sian kanton kaj al mia scivolemo respondis per komprenema rideto. La vojevdisto diris al mi, ke la geamantoj esprimas sin per kanto ĉu en interkonatiĝo ĉu en amindumo. La kantaj vortoj plejparte estas improvizitaj, ekz-e

*Ruĝas bela floro,
floro ruĝa belas.
Bela flor' ĉe rok' prosperas.
Pluki ĝin deziras mia koro.
Sed mi timas ke je roko-krako
furiozos drako,*

kaj

*Por voki la amaton mankas ja
kuraĝo —
jen per ĉapelo mi min ŝirmas je l'
vizaĝo.*

*Ho, kara, kvankam vi ne povas
min ekvidi,
mi tamen povas tra miltruoj vidi
vin laŭ plaĉo.*

Tiuj amkantoj vivece priskribas la ardan amon kaj emociion de la geamantoj.

La suno kliniĝis al la okcidentaj montoj. Sur la kunvenejo ankoraŭ ĉirklulis homamasoj. Sed pro tio ke mi devis veturi aliloken en la sekvanta mateno, mi nevolonte forlasis la kunvenejon. Mi pensis, ke la Aŭtunkomenco por la mjaŭ-oj simbolas printempon de la vivo. Mi sincere deziras al ili feliĉan vivon.



SAVO DE LA OBLIKVIĜANTA PAGODO HUQIU

La pagodo Huqiu konstruita antaŭ pli ol 1,000 jaroj en la fama ĝardeno urbo Suzhou (Suĝou) de Ĉinio oblikviĝas iom post iom same kiel la Oblikva Pagodo en la itala urbo Pisa.

La 2.3-metra oblikveco de tiu 7-etaĝa pagodo daŭre pligrandiĝas ĉiujare je 1.6 milimetroj.

La pagodo altas 47.5 metrojn kaj pezas pli ol 6,000 tunojn. Ĝi staras sur roka deklivo alfrontanta nordon. Ĝia bazamento konsistas el dispecigitaj brikoj, ŝtonpecoj, duonglueca tero k.a.

En 1978 oni starigis sav-centron por la pagodo. Dum la lastaj jaroj famaj ĉinaj specialistoj pri antikva arkitekturo, konstruaĵo-strukturo, fundamento, geologio, grundo, sistologio kaj mezurado estis invititaj por fari esploron kaj doni konsilojn pri riparo de tiu antikva pagodo.

Fine ili aprobis rekonstrui la bazamenton. Ĵus finiĝis la laboro fortikigi la bazamenton de la pagodo.

ESPLORADO PRI LA GRANDA MURO

Arkeologoj de la Interna Mongolio faras esploradon al ĉiuj partoj de la Granda Muro en tiu regiono. La esplorado de la lastaj jaroj montris, ke la totala longeco de la partoj de tiu monda konstrua mirindaĵo estas 50,000 kilometroj.

Dum la lastaj jaroj tiuj arkeologoj pruvis, ke la diversaj partoj de la Granda Muro estis konstruitaj de han-oj kaj paŝtaj nomadoj en la antikveco. La konstrua laboro iris intermite de la Periodoj de Prin-tempo kaj Aŭtuno kaj Militantaj Regnoj ĝis Ming-dinastio.

Tiuj partoj de la Granda Muro konstruitaj en la dinastioj Qin, Han kaj Ming trapasas la Internan Mongolion. Tiuj partoj konstruitaj de Jin-dinastio en la 12-a jarcento staras plejparte en la Interna Mongolio.

Du eksteraj partoj de la Granda Muro de Han-dinastio estis trovitaj ĉe la landlimo inter Ĉinio kaj Mongolio. Iliaj okcidentaj finoj etendiĝas internen de la Mongola Popola Respubliko.

En la gubernio Qingshuihe tuj apud la orienta bordo de la Flava Rivero oni trovis parton de la Granda Muro konstruitan de Ming-dinastio. Ĝi estis konstruita el brikegoj kaj ŝtonpecoj. Tie oni trovis ankaŭ bakuojn por brikoj kaj kalko, ŝtontajlejojn, terasojn por stoki ŝtonpecojn kaj konstruajn instrumentojn. La geologoj trovis, ke la imponeco de tiu parto estas komparebla kun la parto de la Granda Muro ĉe Badaling proksime de Beijing (Pekino).

LA ANTIKVA SILKA VOJO EN ESPLORADO

La pli-ol-20-membra taĉmento por esplorado de la Silka Vojo organizita de la Instituto de Tang-dinastia Historio el famaj ĉinaj specialistoj, profesoroj kaj esplorantoj tiuflankaj ekiris de Lanzhou (Langĝou) lastatempe. Ili faros esploron al la longa Silka Vojo de Urumqi (Urumĉi) de Xinjiang (Ĥingiang) en la okcidento ĝis Chang'an en la oriento (la nuna Xi'an), la ĉefurbo de Tang-dinastio.

La membroj venis el dekelkaj superaj lernejoj kaj scienc-esploraj organizoj de Beijing, Tianjin (Tiangin), Guangdong, Jiangsu (Ĝiangsu), Liaoning (Liaŭning), Henan, Shanxi (Sanhi), Shaanxi (Ŝenhi), Xinjiang kaj Gansu. Estis la unua fojo, ke Ĉinio entreprenas tian grandskalan esploradon al la Silka Vojo.

LUSIN-MUZEO DE BEIJING PLIGRANDIGITA

Antaŭ nelonge pligrandiĝis Lusin-muzeo en la okcidenta parto de Beijing. Ĝi remalfermiĝis okaze de la centa datreveno de lia naskiĝtago. Nun nova nomtabulo "Lusin-muzeo de Beijing" gravurita laŭ la manskribajo de Ye Jianying instaligis super la nova pordo de la muzeo.

Estis riparitaj kaj renovigitaj la mainova loĝejo de Lusin kaj la halo por ekspozicio, kaj nove konstruitaj domo por studo pri Lusin, domo por akcepto de vizitantoj kaj tenejo por manuskriptoj kaj verkoj de Lusin. Nun la muzeo aspektas kiel ĝardeno kun nacia kaj moderna stilo.

INTERESA MIRAĜO

Ĉ. 40 minutojn post la dua posttagmeze de la 7-a de julio, aperis malklare du insuletoj en la maro sude de Miaodao-insulo de norda Shandong-provinco. Post dek minutoj la konturo de la insuletoj fariĝis pli kaj pli klara kaj fine prezentiĝis bela miraĝo. Estis jam klare videblaj tie vojoj, arboj, montpintoj kaj diversaj turoj, kioskoj kaj pavilonoj; vojirantoj kaj veturiloj jen aperis jen malaperis, kaj multaj pejzaĝoj interkruciĝe aperis en sama tempo.

La miraĝo interesis loĝantojn kaj turistojn. Oni diris, ke tiel longdaŭra miraĝo malofte okazis antaŭe.





Lucia Festo de Svedio

de CHEN WENYING
kaj XU FURUI

LA 13-a de decembro estas la Lucia Festo de Svedio. En tiu tago ĉiuj entreprenoj, institucioj, vilaĝoj kaj lernejoj okazigas celebrajn aktivadojn kaj elektas belan knabinon kiel Lucian.

En la pasinta jaro ni partoprenis en aktivado de la festo en Svedio. Ĝi okazis en vasta salono. En pala lampolumo dekelkaj knabinoj en blanka robo kaj kun kandeloj en la mano malrapide iris en la salonon kantante. La unua knabino portis sur sia kapo oran "kronon" kun kvin lumantaj kandeloj. Ŝi estis la bela "Lucia". Atinginte la centron de la salono, la knabinoj ripetis la "Kanton de Lucia" kaj poste eliris el ĝi malrapide. Tiam ĉiuj lampoj en la salono eklumis kaj ĉiuj partoprenantoj ektrinkis ĉampanon kaj ekmanĝis kukojn faritajn speciale por la festo. Akompanate de akordionoj iuj el ili gaje ekdancis popolajn dancojn.

Je la 3-4-a horo frumatene de tiu tago la knabinoj de preskaŭ ĉiuj familioj sin vestas per blanka robo, speciala vesto de la festo. Ili, kun kandeloj sur sia kapo kaj manĝajpleto en la manoj, iras kantante la "Kanton de Lucia" al siaj gepatroj ankoraŭ dormantaj sur lito por doni al ili kukon kaj kafon. Poste ili iras al siaj najbaroj aŭ geamikoj. En la kamparo ili ofte formas longan kolonon, kiu kantante iras de vilaĝo al vilaĝo kaj iliaj belaj kantoj svebas en la aero. Iam ankaŭ petolaj knaboj portas sur si blankan robon por viciĝi en la knabinan grupon.

En la koro de la sveda popolo Lucia estas simbolo de beleco kaj

bonkoreco kaj ŝin koncernas multaj popolaj tradicioj. Ekzemple, kamparanoj prenas la Lucian Feston kiel tagon por fini ĉiujn kamplaborojn en la jaro. Ankaŭ Lucia alportas la informon pri Kristonasko kaj de tiu tago oni komencas prepari la celebradon.

Svedoj ankaŭ prenas Lucia kiel simbolon de lumo. Svedio situanta en norda Eŭropo havas longan vintron kaj la nokto de la Lucia Festo estas rigardata kiel la plej longa kaj plej malluma en la jaro. Tiutage ektagiĝas je la 9-a matene en Stokholmo kaj vesperiĝas jam en la tria horo posttagmeze. La regiono Kiruna en la plej norda parto de Svedio ne vidas sunlumon tuttage. Oni ŝatas Lucia, ĉar ŝi alportas al ili lumon en plej malluma tempo. Post la Lucia Festo la tago fariĝas pli kaj pli longa.

Fiŝkaptista Festo en Niĝerio

de TAN JINKAI

PROKSIME de Niger en la nord-okcidenta parto de Niĝerio estas malgranda urbo Argungu, kie oni okazigas la Fiŝkaptan Feston en februaro ĉiujare.

Legendo diras, ke antaŭ tre longe vivis tie du triboj, kiuj ofte interbatalis pro fiŝkaptado en la rivero Sokoto. En 1934 la estroj de la du triboj faris pacan traktadon en Argungu kaj venis en interkonsenton. De tiam la du triboj vivis en harmonio kaj fariĝis amikaj najbaroj. Por celebri tiun eventon kun historia signifo la du triboj okazigis fiŝkaptan konkurson. Ĉar la konkurso okazis en Argungu, oni nomis ĝin ankaŭ la Festo Argungu. Poste la festo fariĝis tutlanda.

La aktivadon partoprenis ne nur pli ol 3,000 lertaj fiŝistoj venintaj el ĉiuj partoj de Niĝerio, sed ankaŭ malmultaj fiŝistoj de najbaraj landoj. La tribestro de Argungu prezidis la inaŭguron, al kiu estis invititaj

honoraj gastoj. La unua programero de la festo estis elekti "Fraŭlino de Argungu", la elektito estis ricevonta premion. De la komenco de la sepdekaj jaroj oni okazigas ankaŭ agrikulturan ekspozicion dum la Fiŝkaptista Festo ĉiujare. La festaj aktivadoj inkluzivas ankaŭ luktagadon, boksadon, motorcikladon k.a. En la paŭzoj de la sportaj konkursoj la rigardantojn amuzas popolaj dancoj pri nacia historio kaj popola vivo.

La fiŝkaptista konkurso formas la plej altan tajdon de la festo. Kiu kaptas plej grandan fiŝon, tiu ricevas plej altan premion. En la tago de la konkursado rigardantoj svarmas sur ambaŭ bordoj de la rivero kaj konkursantoj staras en kolono surborde. Je la ordono de tribestro, ili sin ĵetas en la riveron. Tiam bruas tamburado, flutado kaj kriadado. Sur la rivero ĉie flosas ore brilantaj kukurbaj ŝeloj grandaj kaj rondaj por enteni kaptitan fiŝon pezan je malpli ol 7 kilogramoj. Laŭ la reguloj de la konkurso, tiuj, kiuj ne sukcesas kapti fiŝon pezan je pli ol 7 kilogramoj, devas esti senigitaj je la rajto partopreni en la konkurso. En la rivero Sokoto larĝa je nur 70 metroj vivas fiŝoj, el kiuj la plej granda havas longecon de ĉ. 2 metroj kaj pezon de ĉ. 60 kilogramoj.

En la festo de la jaro 1980 100 fiŝkaptistoj estis premiitaj. La ĉampiono ricevis kiel premion aviadilan bileton por pilgrimi al Meko, motorbiciklon, radioricevilon, brakhorloĝon kaj 500 niĝeriajn pundojn.





EL ĈINA MODERNA HISTORIO

La Ĉina Popola Liberiga Milito

(Unua parto)

de TANG BAOLIN

EN 1945 la ĉina popolo gajnis la venkon en la milito kontraŭ la agreso de la japana imperiismo, kiu daŭris ok jarojn. En la milito la ĉina popolo suferis grandan perdon. Laŭ konsultebla statistiko la nombro de ĉinaj popolanoj vunditaj kaj mortintaj atingis pli ol 18 milionojn (ekskluzive de tiu de la armeanoj) kaj la valoro de materiaj perdaĵoj estis pli ol 60 miliardoj da usonaj dolaroj.

La venko de la ĉina Kontraŭjapana Rezistmilito, antaŭ ĉio, rezultigis el la brava batalo de la ĉina popolo sub la gvido de la Komunista Partio de Ĉinio. Tamen, la kuomintangaj reaktivuloj kun Jiang Jieshi kiel sia ĉefo intencis forrabi la frukton de la venko, kaj la ĉina popolo denove alfrontis gravan krizon de enlanda milito.

UZURPADO DE LA FRUKTO DE LA VENKO FARE DE JIANG JIESHI

Post la Dua Mondmilito, por meti Ĉinion en sian influferon la usona imperiismo energie instigis Jiang Jieshi fari enlandan militon. Ĝi ne nur transportis aviadile grandan nombron da kuomintangaj trupoj al grandaj urboj de Ĉinio, sed ankaŭ sendis marinfanterion surbordiĝi al la havenurboj Qinhuangdao kaj Qingdao por helpi Jiang rapide okupi strategiajn lokojn kaj fervojojn. En 1945 la nombro de

la usonaj armeanoj en Ĉinio atingis 113,000. Krome, Usono ankaŭ donis al Jiang Jieshi grandan kvanton da dolaroj, municioj kaj aliaj materialoj. Komplotinte kun la japanaj trupoj kaj marionetaj trupoj (la kuomintangaj trupoj kiuj kapitulacis al Japanio en la rezistmilito), Jiang Jieshi ne nur ordonis la japanajn trupojn kaj marionetajn trupojn rifuzi kapitulacian al la popola armeo, sed ankaŭ permesis al ili, kune kun la kuomintangaj trupoj, ataki la liberigitajn regionojn por "rekapti la perditan teritorion".

Tiel, en la daŭro de aŭgusto ĝis oktobro de la sama jaro, Jiang Jieshi okupis, per konkura manovro helpata de Usono kaj per la japanaj kaj marionetaj trupoj, ne nur Shanghai (Ŝanhajo), Nanjing (Nankino) Beiping (Pekino), Tianjin (Tianĝin) kaj aliajn grandajn urbojn, sed ankaŭ gravajn guberniajn urbojn, fervojajn staciojn kaj vilaĝojn de liberigitaj regionoj.

Kontraŭ la krima kunagado inter Usono kaj Jiang la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio ellaboris la politikon batali pinto-kontraŭ-pinte por ĉiu colo da tero. Spite al la malhelpo de la kuomintangaj reaktivuloj kaj la obstina rezistado de la japanaj trupoj kaj marionetaj trupoj, la armeanoj kaj popolanoj de la liberigitaj regionoj firme batalis en solida-

reco por defendi la frukton de la venko en la Kontraŭjapana Rezistmilito. En januaro de 1946 la areo de la liberigitaj regionoj atingis 2,391,000 kvadratajn kilometrojn (t. e. ĉ. kvaronon de la tuta lando), la nombro de la loĝantaro 149 milionojn (t. e. ĉ. trionon de la tutlanda) kaj la nombro de urboj estis 506 (t. e. kvarono de la tutlandaj urboj).

FALSA PACINTERTRAKTADO, VERA PREPARADO POR MILITO

Multe suferinte de la milito, la ĉina popolo deziregis pacon, tial ĝi forte riproĉis la aktivadon de Jiang Jieshi por enlanda milito. Kaj Jiang siavice ne povis ne preni paŝon de politika trompo pro tio, ke unuflanke liaj militaj atakoj al la liberigitaj regionoj foje refoje malsukcesis, kaj aliflanke, li bezonis tempon por movi siajn trupojn en la frontojn. En la 14-a, 20-a kaj 23-a de aŭgusto de 1945, li trifoje telegrame invitis Mao Zedong, la prezidanton de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, al Chongqing (Ĉongking) por fari "pacan intertraktadon".

La Komunista Partio de Ĉinio bone konis la reakcian naturon de Jiang Jieshi, liajn politikojn por enlanda milito kaj intrigon de paco, sed por esprimi la fortan deziron de la ĉina popolo



La Nordokcidenta Kamparmeo liberigis Yan'an.

pri paco kaj malkaŝi la falsan pacon de Usono kaj Jiang, ĝi sendis sian delegacion konsistantan el Mao Zedong, Zhou Enlai kaj Wang Ruofei al Chongqing la 28-an de aŭgusto, kio ege kuraĝigis la tutlandan popolon. Tamen, la Jiang Jieshi-a kliko tute konsterniĝis pri tio. Ili opiniis, ke Mao Zedong ne kuraĝas flugi al Chongqing, kaj intencis atribui al la Kompartio la kulpon pri rifuzo de paco kaj tiel trovi pretekston por fari enlandan militon. Mao Zedong malkaŝis ilian intrigon per sia alflugo, sed ili faris nenian preparon por la intertraktado. Post kvardek tagoj de interparolado en la 10-a de oktobro, estis subskribita la “Resumo de Interparoloj inter la Rerezentantoj de Kuomintango kaj la Komunista Partio de Ĉinio”.

En la “Resumo” Kuomintango estis devigita konsenti la politikon de paco kaj unuiĝo elmetitan de la Kompartio, kaj poste en januaro de 1946 laŭ la “Resumo” ĝi kunvokis politikan interkonsiliĝan konferencon, en kiu la delegacio de la Komunista Partio de Ĉinio kun Zhou

Enlai kiel la estro, unuiĝante kun reprezentantoj de demokratiaj partioj (politikaj grupoj reprezentantaj la nacian burĝaron kaj la superan etburĝaron), devigis Kuomintangon konsenti organizi plej baldaŭ kiel eble koalician registaron kaj fini la unupartian diktaturon de Kuomintango. Kaj la Komunista Partio de Ĉinio siavice faris necesan cedon en determino de la liberigitaj regionoj kaj konsisto de la Liberiga Armeo: konsenti redukti la Liberigan Armeon en la nombron ĝis sepono de la armeo de Kuomintango, kaj norden retiri siajn trupojn el la liberigitaj regionoj sude de Changjiang-rivero.

La kuomintanga reakciularo intertraktadis nur por gajni tempon por prepari la militon. Eĉ dum la intertraktado Jiang Jieshi jam ordonis siajn trupojn ataki la liberigitajn regionojn kaj per la milita operacio rompis la ĵus subskribitajn “Resumon” kaj la rezolucion de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco. En marto kaj aprilo de 1946 Kuomintango kunvokis respektive la Duan Plenan Sesion de la Sesa

Centra Plenuma Komitato kaj la Duan Sesion de la Kvara Politika Konsilantaro kaj freneze kriaĉis por batalo kontraŭ la Kompartio. En la sesio Jiang Jieshi eĉ publike deklaris, ke la Rezolucio de la Politika Interkonsiliĝa Konferenco havas nenian devigpovon por lia persono.

Frue en la 20-a de decembro, 1945 Usono jam sendis G. C. Marshall al Ĉinio kiel specialan senditon de sia prezidanto por helpi, kiel falsa “neŭtrala interpaciganto”, Jiang Jieshi gajni tempon kaj fari pluapasan militan dispozicion, rimarkinte ke la kuomintangaj trupoj trafis malsukcesojn unu post alia en la atako al la liberigitaj regionoj. En sia deklaro pri la politiko kontraŭ Ĉinio farita ĉe la veturo de Marshall al Ĉinio, Truman publike diris, ke la reakcia registaro de Jiang estas la unika leĝa registaro de Ĉinio, malkaŝe intervenis en la internajn aferojn de Ĉinio kaj kalumniis, ke la ekzisto de la armeo de la Komunista Partio de Ĉinio ne konformas al la ĉina politika unuiĝo. En sia “interpaciga laboro” Marshall ĉiam instigis la kuomintangajn trupojn ataki la liberigitajn regionojn kaj malhelpis la Liberigan Armeon en ĝia reatako, tiel ke la enlanda milito pli kaj pli intensiĝis. Marte de 1946, malgraŭ la riproĉado de la internacia publika opinio Usono stariĝis en Ĉinio grupon de militaj konsilantoj kaj energie helpis Jiang plani la enlandan militon. Kaj la materialoj, per kiuj Usono helpis Jiang en la unua duonjaro de 1946, valoris 1,335 milionojn da usonaj dolaroj, t.e. duoblo de tiu per kiu Usono helpis Ĉinion en la periodo de la Kontraŭjapana Rezistmilito.

En la sama periodo la nombro de la armeo ekipita de ĝi por Jiang atingis 45 diviziojn kaj la nombro de la kuomintangaj trupoj aviadile kaj sipe transportitaj de ĝi al la frontoj de la enlanda milito atingis 540,000 personojn.

La 17-an de junio, 1946, la Jiang Jieshi-a kliko plenumis militan dispozicion kaj senskrupule komencis plenamplersan atakon al la liberigitaj regionoj.

PLENAMPLEKSA ATAKO AL LA LIBERIGITAJ REGIONOJ

En la komenco de la plenamplersa enlanda milito Kuomintang havis superecon en siaj militfortoj. Ĝi havis armeon de 4,300,000 militistoj bone ekipitaj. Ili arogante atakis la liberigitajn regionojn kaj fanfaronis, ke ili tute ekstermos la Liberigan Armeon en 3-6 monatoj. Tiam la lasta nombris nur 1,200,000 personojn malbone ekipitajn. Ili havis malmulte da kanonoj, malhavis aviadilon kaj tankon, por ne paroli pri militŝipo kaj eksterlanda helpo. Pro la rimarkinda malegaleco en fortoj de la malamiko kaj ni, iuj popolanoj kaj en- kaj eksterlandaj amikoj dubis kaj maltrankviligis pri tio, ĉu la Kompartio povas gajni la venkon.

Por ideologie armi la tutan Partion kaj la tutan popolon kaj starigi ilian memfidon al kuraĝa batalo kaj nepra venko, en sia parolado kun la usona ĵurnalistino Anna Louise Strong, kamarado Mao Zedong faris sian faman tezon, ke ĉiuj reakciuloj estas paperaj tigroj. Li montris: “En aspekto la reak-


ciuloj estas timindaj, fakte ili ne havas forton eksterordinaran. Rigardate el longperioda vidpunkto, vere potenca forto apartenas ne al la reakciuloj, sed al la popolo.” Tiu tezo ege pligis la fidon de la armeanoj kaj popolanoj de la liberigitaj regionoj al la venko.

Laŭ la penso de Mao Zedong strategie malestimi la malamikojn kaj taktike serioze trakti la malamikojn, la Komunista Partio de Ĉinio ellaboris kompleton da strategiaj politikoj, difinante, ke en tiu etapo oni prenos kiel la ĉefan celon ekstermadon de la viva forto de la malamiko anstataŭ konservon kaj kapton de urboj kaj lokoj; por ĉiu operacio estas necese koncentri absolute superan forton (3-6-oble pli grandan ol tiu de la malamika forto) por laŭeble ekstermi ĉiujn malamikojn, nur tiel ni povas malfortigi la malamikojn plej efike kaj havigi al ni plej multe da armiloj kaj soldatoj. Laŭ la dirita politiko la Liberiga Armeo faris pli ol 160 batalojn, ekde julio de 1946 ĝis februaro de 1947, kaj ekstermis pli ol 710,000


militistojn de la malamikoj; kvankam Kuomintang okupis 105 urbojn de la liberigitaj regionoj, tamen ĝi devis elspezi meznombre koston de 7,000 soldatoj por ĉiu el ili. Kaj plie, pro la disvastiĝo de la okupita regiono, ĝia batallinio plilongigis. Por preventi atakon de la popola armeo, ĝi devis sendi grandnombre trupojn por gardi siajn trafikajn liniojn kaj nove okupitajn urbojn, kio multe reduktis ĝiajn moveblajn trupojn kaj devigis ĝin ŝanĝi la politikon de plenamplersa atako en tiun de “atako al gravaj punktoj”.

En tiu tempo la kuomintangaj trupoj faris atakon en du direktoj: Unu al la nordshaanxi-a bazloko kun Yan'an, la sidejo de la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio, kiel la centro. Jiang Jieshi sendis trupojn de 230,000 soldatoj komandatajn de lia konfidata generalo Hu Zongnan, por ataki Yan'an kaj forigi la centrajn instancojn de la Komunista Partio de Ĉinio, kaj li intencis per tio stimuli la batalspiriton de siaj trupoj kaj la “popolon”


Popolanoj kaj armeanoj de Yan'an gaje celebris la liberiĝon.



Skiza mapo pri la enlanda milito fare de Kuomintango



1. Wuhan 2. Nanjing 3. Shanghai
4. Operacio ĉe Huangqiao 5. Lian-yungang 6. Xuzhou 7. Zhengzhou
8. Xi'an 9. Yan'an 10. Jinan 11. Operacio ĉe Menglianggu 12. Qingdao 13. Tianjin 14. Beiping (Beijing)
15. Guisui (Huhhot) 16. Jinzhou 17. Shenyang 18. Changchun 19. Bohai-marŝo 20. Flava Maro 21. Hainan-insulo



kaj trupoj terure laciĝis kaj pli ol 40,000 militistoj de ili estis ekstermitaj en kvin gravaj operacioj. Kaj Yan'an estis rekapitata de la Liberiga Armeo la 22-an de aprilo de 1948. Samtempe kun tio, en la operacio ĉe Menglianggu de Shandong-provinco, la Orientĉinia Kamparmeo ekstermis la tutan 74-an divizion kun 32,000 soldatoj, unu el la elitaj trupoj de Kuomintang, kaj ĝia estro Zhang Lingfu estis pafmortigita. Tiel ankaŭ la "atako al gravaj punktoj" fare de Jiang Jieshi estis frakasita.

regatan de Kuomintang. La alia direkto al la Shandong-a liberigita regiono. Gu Zhutong, alia konfidata generalo de Jiang, gvidis 450,000 soldatojn kaj intencis ekstermi la Orientĉinian Kamparmeon gvidatan de generalo Chen Yi por forigi la minacon al la gravaj urboj Nanjing kaj Shanghai de Kuomintang.

La taskon defendi Yan'an prenis sur sin la Nordokcidenta Kamparmeo gvidata de generalo Peng Dehuai. Ĝi havis nur 20,000 personojn. En nombra supereco de 10 kontraŭ 1, Hu Zongnan forte deziris fari deci-

dan batalon kontraŭ la ĉefa forto de la Liberiga Armeo. Por gajni la iniciativon kaj ekstermi la malamikojn en movado, la 19-an de marto de 1947 la Centra Komitato de la Komunista Partio de Ĉinio evakuis Yan'an. Laŭ la kaŝluda taktiko ellaborita de Mao Zedong generalo Peng Dehuai unue kaŝis la ĉefajn fortojn kaj allogis internen la malamikon per parto de la trupoj, por ke la malamikaj trupoj rondiru en la montregionoj kaj falu en la embuskan ringon de la Liberiga Armeo. Post kelkaj monatoj la malami-



Ekde 1981, oni devas pagi por la anoncetoj laŭ la prezo 1 internacia respondkupono por 5 vortoj aŭ mallongigoj kaj por fotoj laŭ la prezo 1 respon. kup. por spaco de 1 linio. Niaj perantoj, kontribuantoj kaj aliaj kunlaborantoj povas ĝui minimume 30-pocentan rabaton. Es-

BELA DONACO

AL LA ABONANTOJ DE 1982



JAM komenciĝas la varbkampanjo de 1982 por El Popola Ĉinio. Tuj abonu ĝin jam nun! Se vi abonos ĝin en la periodo de la 1-a de novembro ĉijare ĝis la 28-a de februaro venontjare, vi povos senpage ricevi la belan kalendaron de 1982.

La kalendaro estas eldonita de nia redakcio por ĉiuj abonantoj, inkluzive tiujn, kiuj faros sian abonon dum la varbperiodo. Ĝi havas 14 paĝojn kun koloraj ĉinstilaj pentraĵoj kaj estas en formato de 37.5 cm X 25.5 cm. Tiu bela donaco bone servos al vi ne nur kiel kalendaro tutjare, sed ankaŭ kiel valora artaĵo por longe.

Ni dankeme esperas, ke vi abonu aŭ reabonu la gazeton ĝustatempe. Senpage specimeno de EPC estas sendata laŭ peto.

Bonvolu sendi vian abonilon kaj abonkotizon al peranto en via lando aŭ la Esperanta Sekcio de Guoji Shudian, P. O. Kesto 313, Beijing, Ĉinio.

La Redakcio de EPC

perantaj organizoj kun konsento de la redakcio de EPC povas senpage aperigi, en la revuo, anonceton kun maksimume 50 vortoj. La redakcio ne respondecas pri la enhavo de la anoncetoj, nek pri la plenumado de la promesoj faritaj en ili.

La Red.

* Brent Beacham, 12-j lernanto, 659 East 800 South, 9B, Salt Lake City, Utah 84117, Usono, dez. kor. kun ĉina junulo.

* Andreo Midralski, 14-j knabo, ul. Raszhowska 7/8, 63-400 Ostrow Wlkp, Pollando, dez. kor. pri historio kaj geografio.

* S-ro Kuedi-Kiakanua, P.K. 13 Lukala, BAS-Zaire/Zairio, dez.

kor. kun tutmondaj geknaboj kaj praktiki mian Esp-on. Mi vol. ricevi librojn, ĵurnalojn kaj romanojn.

* Petro Kurach, 16-j, Str. Stacyjna 55/18, PL-08-400 Garvolino, Pollando, dez. kor. tutmonde pri diversaj temoj, precipe pri sporto kaj poŝtmarkoj.

* Gemembroj de la Demokrata Junulara Asocio ekligos amik-kontakton kun geesp-istoj el tutmondo. Adr. Z.M.D. — Esp-a Sekcio, 65-001 Ziel. Gova, Reja 6, Pollando.

* Virag Mikloš, 23-j studento, Juana Milankovića 29B, 24000 Subotica, Jugoslavia, dez. kor. pri fotado, vojaĝo kaj politiko.

* Jaroslav Matviichin, 101000 Moskva, do Vostrebomania, USSR, dez. kor. Esperante kun kolektantoj de bildkartoj, insignoj kaj neuzitaj poŝtmarkoj en Ĉinio, Japanio k.a. landoj.

* Liang Ziming, 29-j. dez. kor. kun alilandaj junaj gee-istoj. Intereso: fotado, poŝtmarkoj, belaj-kartoj, naĝado, vojaĝo, muziko ktp. Adr. Nanning-a Esperanto-Studrondo, P.O. Kesto 13, Nanning, Guangxi, Ĉinio.

* Usona esp-isto Sidney Tanaban, 42-j. fraŭlo, volas kor. pri grafologio, naciaj alfabetoj, kaligrafio. adr.: 3456 22nd St., San Francisco. California, U.S.A.

JI LIQUN:

Pri la venontaj manĝaĵoj

Ilustraĵoj de CHANG TIEJUN



KUN la senĉesa kresko de la monda loĝantaro, kiel plenumi la bezonon de la homoj pri manĝaĵoj jam fariĝis urĝa problemo. En la pasintaj 20 jaroj la loĝantaro de la mondo duobliĝis, dum la grena produktokvanto kreskis nur je 40%. Nun ankoraŭ nemalmultaj homoj suferas malsaton. Oni taksis, ke la loĝantaro sur nia terglobo ankoraŭ duobliĝos ĝis la fino de la kuranta jarcento. Kiel oni povas satigi tiel multajn loĝantojn?

Naskolimigo estas efika metodo kaj tiurilate multaj landoj jam akiris sukceson. Sed pro politika kaj religia kialoj la naskolimigo ankoraŭ ne povas esti efektiva ĝenerale en la mondo. En certaj regionoj oni povus produkti pli multe da greno per kultivigo de virga tero aŭ reformo de dezerto, sed tio postulus teruran elspezon. La antaŭa bezonus 500 milionojn da tunoj da sterko ĉiujare kaj la

posta konsumus 3 aŭ 4 tunojn da akvo por produkti pecon da pano. Evidente tiuj ideoj ne povas esti grandskale efektivigitaj en mallonga tempo.

Por solvi tiun problemon la plej bona rimedo estas uzi la potencon de sciencoj kaj teknikoj. Nun sciencistoj, krom plua esplorado pri altigo de hektara produktokvanto de greno kaj produktokvanto de viando, ovoj kaj kortbirdoj, faras esploron por trovi novajn vojojn por pliprodukti manĝaĵojn: Unue, esplorado por ebligi ŝanĝon de antaŭe neuzataj kromproduktaĵoj en manĝaĵ-produktado en manĝeblaĵojn; due, krei novajn manĝaĵojn.

Akiri manĝaĵojn el maroj. La maroj, kiuj okupas 70% de la tergloba surfaco, nun liveras nur 2% de la homaj manĝaĵoj. Por ke la maroj liveru al la homo pli da nutraĵoj, la plej efika rimedo estas pliigi kaj plibonigi fiŝproduktaĵojn. Iuj

landoj jam trovis novajn metodojn de fiŝkaptado. Laŭ la teorio de I. P. Pavlov Japanio trejnigis log-fiŝojn por kapti pli multe da fiŝoj. Je donita signalo la trejnigataj log-fiŝoj kondukas fiŝaron en la fiŝreton. Usono ankaŭ sukcese trejnigis delfenojn por kolekti kaj kapti pli multe da fiŝoj. Bredo de fiŝoj estas alia efika rimedo por pliigi la kvanton de fiŝoj por manĝo. Ĝis la jaro 1985, kvarobliĝis la kvanto de breditaj fiŝoj liverota al merkato. La fiŝoj en profunda maro, ne tre bongustaj, estis uzataj malmulte kiel homa manĝaĵo kaj preskaŭ nur por fabriki fiŝpulvoron por nutri brutojn, sed estonte ankaŭ ili fariĝos unu el la ĉefaj homaj nutraĵoj. Tio pliigos ĉiujare la kvanton de fiŝoj por homa manĝaĵo de 50,000,000 tunoj. Tio signifas, ke la kvanto de proteino por la homaro pliigos je 30,000,000 ĝis 35,000,000 tunoj.

Dank' al klopodado de sciencistoj, ankaŭ algo fariĝos bon-

gusta manĝaĵo. La procento de proteino en algo kulturata en sensala akvo povas atingi 70-75%, dum tiu de la koka ovo nur 60%. Diversaj freŝaj, fridigitaj aŭ sekigitaj algoj okupos gravan lokon en la estontaj manĝaĵoj.

Multaj homoj ŝatas viandon, sed viando entenas malmulte da proteino, ekz. bovajo nur je 16%. Krome, la bredo kaj buĉado de brutoj bezonas grandan elspezon. Tial iuj taksis, ke la proporcio de viandoj en la estontaj manĝaĵoj malpliigos kaj ili eble estos anstataŭitaj de legomaj proteinoj kun viandaj gustoj. Iu kompanio de Japanio produktis "marbovan viandon" el fiŝpulvoro simila al la fibrino de bovidaĵo. Iu brita kompanio ekstraktis el fungoj proteinojn por produkti viandon. Por redukti la ekonomian kaj socian


koston por produkti viandon, oni nun kulturatas brutojn kun malpli multe da graso kaj pli multe da viando.

Krome, iuj landoj serĉas kernian metodon por fari sintezan manĝaĵon. Iuj sciencistoj faras esploradon por produkti suragaton de viando el bakterioj, kies 80% konsistas el proteino, sed la produkta kosto estas multe malpli alta ol tiu de viando.

Ĝenerale ĉiuj landoj donas atenton al utiligo de neuzitajoj produktitaj en manĝaĵ-fabrikado. Ekz-e oni utiligas, per teknika renovigo, neuzitajojn en produktado de fromaĝo, fromaĝa proteino kaj iuj bovlaktaj proteinoj, kaj tiujn en produktado de biero por fari plaĉajn manĝaĵojn. En iuj landoj oni forĵetas la sangon de buĉitaj brutoj, sed en aliaj landoj oni prenas ĝin kiel

manĝaĵon. La sango de bovo pezas je sesono de ĝia tuta korpopezo kaj 15-20% de ĝi estas proteino, t.e. pli multe ol bovlakto, krome ĝi entenas graŝon kaj sukron. Post elpreno de la karbono kaj natrio en ĝi, ĝi povas fariĝi nutroza manĝaĵo. 5% de la ovoj por elkovi koki-dojn estis forlasitaj pro nefekundigo. Nun tiuj neelkoveblaj ovoj povas esti antaŭe elprenitaj por homa manĝado dank' al nova kontrola tekniko.

La donitaj ekzemploj montras, ke multaj novaj teknikoj povas esti vaste utiligataj por pliigi la homajn manĝaĵojn. En la estonteco, la homoj havos manĝaĵojn ne nur sufiĉajn, sed ankaŭ pli bonajn kaj pli malkarajn. Ĉia ajn pesimisma aserto kaj pasiva sinteno de nenifardo koncerne al tiu problemo estas eraraj.



RIĈA RIKOLTO DE SOMERAJ GRENOJ KAJ FRUA RIZO DE ĈINIO EN 1981

La totala produktokvanto de someraj grenoj atingis pli ol 60,000,000 tunojn, je 3,000,000 tunoj pli multe ol tiu de 1980, kvankam la areo por someraj grenoj en 1981 reduktiĝis je ĉ. 1,300,000 hektaroj kompare kun tiu de 1980. La totala produktokvanto de frua rizo de pli ol 10,000,000 hektaroj da kampoj superis 50,000,000 tunojn, je pli ol 1,000,000 tunoj pli multe ol tiu de 1980.

NOVA PROGRESO DE SILKA INDUSTRIO DE JIANGSU-PROVINCO

La silka produktokvanto de Jiangsu-provinco en la unua duonjaro de 1981 kreskis je 14.7% kom-

pare kun tiu en la sama periodo de 1980, kaj tiu de silkajoj je 3.5%.

Jiangsu-provinco, konata kiel lulilo de silka industrio, estas ĉefa produkteto de la ĉina silko. Ĝi produktas pli ol 270 tradiciajn kaj novajn specojn, kiel tafto kaj silko de sintezaj fibroj.

Silko de tiu provinco vendiĝas en pli ol 60 landoj kaj regionoj. Antaŭ nelonge tafto produktita de la Dongwu-a Silka Fabriko de Suzhou estis elektita por fari ceremonian veston al la brita reĝido Charles por lia edziĝo.

ĈINIO, LANDO PLEJ RIĈA JE RARA TERO POR INDUSTRIO

Kiel esplorite, en 19 ĉinaj provincoj troviĝas rara tero, kies porindustria rezervo estas kvinoble pli multa kiom la totala rezervo de ĉiuj aliaj landoj. Ĉinio havas jam pli ol 20 fabrikojn, kiuj produktas pli ol 100 specojn de rarateraj produktaĵoj kun malsamaj normoj. Nun multaj

ĉinaj industriaj branĉoj aplikas novan teknikon aldoni raran teron en produktado de vivbezonaĵoj kaj porindustriaj objektoj por levi ilian kvaliton.


PETROL-GASO ESPLORITA EN LA ORIENTA ĈINA MARO

Ĉinio trovis multajn tavolojn da altensia natura gaso kaj olea sablo en la unua esplorputo borita en la Orienta Ĉina Maro.

La puto ĉ. 460 kilometrojn sud-oriente de Shanghai havas profundecon de 3,400 metroj, kaj estas je 77 metroj sub la akvo.

Respondeculo de la Geologia Ministerio de Ĉinio diris, ke kiel materialo montras, la areo de la sedimenta baseno en la Orienta Ĉina Maro egalas proksimume la totalan areon de la Nord-Ĉinia kaj Nordorient-Ĉinia Ebenajoj. La baseno kun granda sedimenta dikeco havas oledonan stratumon. La materialo akirita de la esplorputo montras, ke tiu loko estas riĉa je petrol-gaso.

LOKOJ MENCITAJ EN ĈI TIU NUMERO



1. *Beijing*
2. *Sichuan-provinco*
3. *Zhoushan-insularo de Zhejiang-provinco*
4. *Tuĝja-Mjaŭ-a Aŭtonoma Sub-provinco de Okcidenta Hunan-provinco*
5. *La naturparko Fanĵing-monto*

Kantoj kaj dancoj de Ĝuang-oj

Fotoj de YAN JIN

Solludo de kordinstrumento




La danco "Ĉe la Bordo de Lijiang-rivero"


Ĝuang-nacieco kun pli ol 12 milionoj da membroj estas la plej granda naciminoritato de Ĉinio. Ili loĝas ĉefe en la Guangxi-a Ĝuang-nacieca Aŭtonoma Regiono kaj malmulte en la provincoj Yunnan, Hunan kaj Guangdong. De la antikveco la ĝuang-oj havas siajn proprajn kulturon kaj arton. Ilia parola literaturo estas tre riĉa kaj popolkantoj aparte famaj. En printempo kaj aŭtuno ĝuang-oj, ĉu viroj aŭ virinoj junaj kaj maljunaj, ŝatas kanti popolkantojn alterne.

La danco "Batalamburado en Huashan"



Popolaj Argila





Besto en Mito

longvivulo sur Azeno



Patrino kun Fileto

Kuŝanta Bovo



